

januaro 1970

63-a jaro

n-ro 770 (1)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



Edukado en 1970 : p 4

Vi trovos

sur p. 14 ekstraktojn el leteroj pri la ĉefartikolo de nia novembra numero kaj la satiraĵo "Doloroj de Esperanto", ricevita en la Centra Oficejo ĝis la tago de la finredakto. Ĉiu, kiu sekvis la skribadon de "Heroldo" dum la lastaj jaroj sub la nuna redakcio, bone komprenis nian reagon. Sed, krom multaj aproboj, estis ankaŭ mallaŭdoj.

Kiam pereas 100 homoj en aer-akcidento, la mondo sentas ŝokon; sed la unuopajn mortojn sur la aŭto-ŝoseoj ĝi akceptas trankvile. Kiam gazeto subfosas kaj misprezentas dum jaroj, malmultaj protestas; sed kiam oni per unu fojo firme rebatas, tiam leviĝas indignaj voĉoj por defendi ĝin. Unu afero tamen estu klara: en la novembra "Esperanto" ni rebatis, ne kontraŭ iaj bonintencaj kritikoj aŭ opinioj, sed kontraŭ deformado de faktoj kaj evidente malbonvola sinteno al UEA.

Enhavo

- 1 Pliaj agadoj en la nova jaro (Lapenna)
- 2 Plurdirekte utilaj kurso-diskoj
- 2 La malfeliĉoj de Vjetnamujo (citaĵoj)
- 3 Dan-polaj kontaktoj pri Esperanto-instruado
- 4 Partopreno de UEA en la Internacia Jaro de Edukado
- 4 Novaj perspektivoj por aŭtomobilista agado
- 6 Kultura tradicio kaj Esperanto (Auld)
- 8 Komuna lingvo — la japana (Shelton Allen)
- 10 Nekrologoj Kaloumenos, Ranft, Urban
- 11 "Skizo por la erotiko moderna" (Rózewicz/Tyblewski)
- 11 Antaŭ 50 jaroj... en "Esperanto", jan. 1920
- 11 Dek pentro-majstroj (Zacho)
- 12 Informoj de CED
- 13 Recenzo
- 13 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 14 Post la "Doloroj" (leteroj de legantoj)
- 15 Loke-Fake (mallongaj novaĵoj)
- 16 55a Universala Kongreso de Esperanto, Vieno, 1970
- 17 TEJO-Paĝo
- 18 Esperanto en radio
- 19 Oficiala informilo n-ro 430
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

Edukado — almenaŭ sur la elementa nivelo — devus esti deviga kaj senpaga. Tiu principo, cetere jam trovebla en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, estas hodiaŭ tutmonde akceptita — almenaŭ sur papero. La realo estas tute alia. Granda nombro da landoj — precipe en la suda hemisfero — tutsimple ne disponas la financajn rimedojn por efektiviĝi la principon: por prepari la instruistojn, konstrui lernejojn, eldoni lernolibrojn. Aliaj registaroj timas la efikojn de universala edukado aŭ ne komprenas ĝian valoron kiel ekonomian investon.

La samo validas pri la instruado de la Internacia Lingvo: jen unu reĝimo timas la efikojn de libera komunikado inter la popoloj, dum alia ankoraŭ ne komprenas la grandegajn ekonomiajn avantaĝojn de unulingva internacia kompreniĝo.

Kontribuante al la tutmondaj klopodoj en la Jaro de Edukado, UEA aparte emfazos la mankojn de la lingva edukado. (P.4)

(Foto: Unesko/D. Seymour)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo"

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstre. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, Str. KRN 1 m 41, Warszawa 1, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

PLIAJ AGADOJ EN LA NOVA JARO



La Komitato en Helsinki reekzamenis la Laborplanon

Dum la Universala Kongreso en Helsinki kaj aparta Komisiono kaj la tuta Komitato denove okupiĝis pri la Dua Baza Laborplano de UEA.* Ili trovis ĝin "multflanka kaj bone prilaborita", sed bedaŭrinde ne sufiĉe atentata de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj. Tial la Komitato, aprobinte diversajn proponojn de la Komisiono, rekomendis al ĉiuj rapidigi ĝian realigon. La emfazo estas sur "ĉiuj", ĉar estas evidente, ke nur harmonia kunagado de la organizaĵoj kaj unuopuloj apartenantaj al UEA, ilia interhelpo kaj reciproka influo ene de la tuto, ebligas plian progresadon kaj garantias realajn sukcesojn kun daŭra valoro.

Fidante, ke efektive en 1970 ĉiuj Esperanto-organizaĵoj maksimume streĉos siajn fortojn por efektivigi tiujn partojn de la Plano, kiuj apartenas al ilia kompetenteco, ĉi tie ni koncize listigu nur la ĉefajn plibonigojn kaj novajn agadojn de la centraj organoj.

Organiza fortikigo

Ekzistis kaj parte ankoraŭ ekzistas la problemoj de efika komunikado precipe inter la centraj organoj de UEA kaj la landaj aŭ fakaj organizaĵoj. Por forigi la mankojn, kiuj en tiu sfero ofte kaŭzis prokrastojn kaj bremsis la laboron, la Komitato rekomendis al la landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj elekti inter la komitatanoj specialan komisiiton, kies ĉefa tasko estas prizorgi la glatan rilatadon inter la centraj organoj de UEA kaj la koncerna organizaĵo. Plue, por aktivigi kiel eble plej multe la komitatanojn en la laboro de la Asocio kaj familarigi ilin kun ĝiaj problemoj, estas formitaj Konstantaj Komisionoj de la Komitato pri la ĉefaj branĉoj: landaj kaj fakaj asocioj; financoj; turismo; eksteraj rilatoj; literaturo kaj eldonado. La sistemo de komisiitoj kaj komisionoj jam ekfunkciis. La aliaj agadoj sur tiu kampo estas: popularigo de UEA per artikoloj, prelegoj kaj la bulteno "Informa Servo de UEA"; reprezentiĝo en la landaj kaj fakaj Esperanto-kongresoj aŭ similaj aranĝoj, apartaj budoj de UEA dum tiaj kunvenoj kaj renkontiĝoj de delegitoj kaj fakdelegitoj; klopodoj aligi al UEA la nealiĝintajn asociojn, se ili plenumas la statutajn kondiĉojn; intensa varba kampanjo por havigi al la Asocio kiel eble plej multajn individuajn membrojn. Apartan atenton meritas nia Junulara Sekcio.

La Estraro de TEJO jam ekagis en tiu direkto, sed ĉiu pli aĝa membro povas multe helpi — kaj ankaŭ ricevi — per aliĝo al TEJO kiel patrona membro.**

La tasko varbi novajn individuajn membrojn estas des pli facila, ĉar la kotizoj, eĉ post la deviga aliĝo, restas tre malaltaj kompare kun tio, kion la membraro ricevas en formo de publikaĵoj kaj diversaj servoj. Cetere, ni ne organiziĝis por ricevi, sed por disvastigi la lingvon per komunaj fortoj.

Novaĵoj en U.K.

Niaj mondaj kongresoj, kiuj jam atingis altan nivelon de efikeco, fariĝos ankoraŭ pli interesaj. La publika debato, enkondukita en Helsinki, estos ripetita en Vieno, sed la prezento de la enkondukaj vidpunktoj estos mallongigita por doni al la ĉeestantoj pli da tempo por la diskuto. La Ĝenerala Kunveno, kiu kutimas pritrakti la Estraran Raporton nur fine de la semajno, en Vieno okazos tuj en la komenco, tiel ke la Komitato kaj Estraro povos konsideri ĝiajn konkludojn. En Vieno okazos ankaŭ aparta kunveno de la fakaj organizaĵoj, delegitoj kaj fakdelegitoj. La fakaj organizaĵoj estos kuraĝigitaj organizi kunvenojn pri fakaj temoj en kunlaboro kun la samfakaj neesperantistaj organizaĵoj, laŭ la modelo de la jurista Esperanto-asocio.

Eldonado kaj IJE

Inter la multaj novaj paŝoj, entreprenotaj en 1970, aparte menciindaj estas la plano aĉeti malgrandan presmaŝinaron en tri stadioj kaj la partopreno de UEA en la Internacia Jaro de Edukado, pri kiu aperas detaloj en tiu ĉi numero. La Laborplano de 1962 antaŭvidas modernigon de la Oficejo, interalie, per akiro de "malgranda moderna presmaŝino". Nun la ideo verŝajne realiĝos. Tio interalie ebligos multe pli intensan eldonan aktivecon kaj plibeligon de la ekstera aspekto de la nun stencilataj publikaĵoj.


Necesas atentigi, ke la ĵus tuŝitaj organizaj plibonigoj kaj novaj agadoj neniel signifas neglekton en kiu ajn senco de la jam establitaj kaj bone funkciantaj laboroj de la Asocio en diversaj branĉoj. Ili estas nur pliaj brikoj en la realisma kaj laŭplana konstruado de kiel eble plej potenca UEA en la intereso de la Internacia Lingvo.

Prosperon al UEA kaj ĝiaj organizaĵoj; personan feliĉon al la membroj kaj ĉiuj uzantoj de Esperanto en la Nova Jaro!

Ivo Lapenna

* La teksto de la Plano troviĝas en la broŝuro Statuto kaj Regularoj, Rotterdam, 1968, 44-57.

** PM de TEJO pagas jarkotizon de 16 gld. kaj ricevas la revuon "Kontakto" kaj la novaĵbultenon "NNN".



Plurdirekte utilaj kurso-diskoj

El Svedujo venas novspeca disko-kurso. UNIVOX ĝi nomiĝas. Kaj ĝia ĉefa specialeco troviĝas en tio, ke eblas uzi ĝin en pluraj direktoj. Turko povas uzi ĝin por lerni Esperanton. Finno povas studi per ĝi la francan. Esperantisto de kiu ajn el multaj diversaj lingvo-grupoj povas same profiti ĝin por studi iun nacian lingvon, pere de Esperanto!

La ŝlosilo de tiuj multflankaj eblecoj estas, ke la materialoj de la kurso — ĉ. 1200 frazoj kaj esprimoj sur sondiskoj kaj en tekst-libroj — estas egalaj en ĉiuj lingvoj, en kiuj ĝi estas ĝis nun eldonita. De post la ĵusa eldono de la Esperanta materialo, la nombro de lingvoj estas 23: krom la Internacia, la angla, bulgara, dana, ĉeĥa, finna, franca, germana, greka, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serbo-kroata, sveda kaj turka.

Ĉar la kurso konsistas simple el praktika frazaro, ĝi evidente ne povas instrui rekte la gramatikon; tamen por ĉiuj uzantoj ĝi donas eblecon ekzerci la lingvo-scion, plivastigi la vortprovizon kaj parkeri utilajn esprimojn. Oni prefere nomu ĝin do helpilo por la lernado, ol kurso aŭ instrumentodo.

Ok diskaj plus tekstoj

La materialoj UNIVOX konsistas el 8 diskaj en la studata lingvo, plus du tekst-libroj: unu en tiu sama studata lingvo, la alia en la lingvo, kiun oni jam scias kaj per kiu oni deziras lerni. Bulgaro, kiu studas la anglan, ricevas diskajn en la angla kaj po unu libro en la angla kaj bulgara. Greko, kiu lernas Esperanton, ricevas la diskajn en Esperanto kaj po unu libro en la greka kaj Esperanto. Esperantisto, kiu volas konatiĝi kun la japana, ricevas la diskajn en la japana kaj la tekst-librojn en la japana kaj Esperanto. La 8 diskaj estas fakte sonkartoĵoj. Laŭ atesto de sveda ŝtata material-prova instanco, ili estas milfoje uzeblaj. Se la lernanto tion preferas, li povas ricevi anstataŭ diskaj sonbendon (9,5 cm/sek.) aŭ sonbendan kaseton.

UNIVOX jam vendas sian kurson tra la tuta mondo. Per la aldono de la Internacia Lingvo ĝia utileco kaj ĝia merkato sendube vastiĝos.

LA Malfeliĉoj

Miskompreno

En la usona gazeto "Look" (29 julio 1969) aperis artikolo de Norman Cousins pri la milito en Vjetnamujo. El tiu artikolo ni ĉerpas jenan ekstrakton:

"Wyzner¹ ricevis informon, ke Ho chi minh verkis leteron al ĉefministro Lal Bahadur Ŝastri de Hindujo, sendante kopiojn al interesitaj ŝtatestroj tra la mondo. Li diris, ke tiu letero rekte respondas — se oni ĝuste interpretas ĝin — al la demandoj, kiujn mi faris pli frue tiun tagon. Ĝi celis respondi ankaŭ al punktoj tuŝitaj de ambasadoro Averell Harriman dum lia vizito al Varsovio du semajnojn antaŭe. Wyzner petis min komuniki jenan mesaĝon al Vaŝingtono:

La letero de Ho chi minh

"Ministro pri eksterlandaj aferoj Adam Rapacki (Polujo) deziras atentigi pri la letero de Ho chi minh, kiu aperis ĉi-matene (29 januaro, 1966) en "New York Times". Li komprenas, ke Vaŝingtono eble emos konsideri, ke la letero enhavas nenion esence novan, ĉar ĝi ripetas starpunkton antaŭe deklaritan. Tamen tiu sama alineo, kiu petas akcepton de la kvar punktoj de Hanojo, enhavas ankaŭ gravan frazon, kiu, se oni ĝuste interpretas ĝin, ebligas malkovri ion esence novan en la starpunkto de Hanojo. Specife, tiu alineo diras: "Se la Usona Registaro vere deziras pacan solvon, ĝi devas akcepti la kvar-punktan starpunkton de la Registaro de la Demokratia Respubliko Vjetnamujo kaj tion pruvi per efektivaj agoj."

"Mi diris, ke mi rajtas paroli nur kiel privatulo, sed ke profunde maltrankviligas min la elekto de la esprimo 'devas akcepti' en la letero de Ho chi minh. Finfine, Usono ja ne postulas, ke Hanojo anticipu akceptu nian propran starpunkton. La celo de la intertraktadoj estas: atingi interkonsentojn, kaj ne firmigi fiksitajn starpunktojn.

"Mi telefonis al Valenti², kaj li surpaperigis la mesaĝon laŭvorte. Ankaŭ li tuj reagis, kiam ni atingis la vortojn 'devas akcepti'. Li diris: Se Hanojo restos ĉe tiu starpunkto, estas malfacile imagi, kiel intertraktadoj estos eblaj.

"Frue en dimanĉo, la 30an de januaro, telefonis Wyzner. Ĝus alvenis el Norda Vjetnamujo klarigo pri la elekto de la vortoj 'devas akcepti' en la letero de Ho chi minh. La letero estis tradukita el la franca. En la originalo aperis la vortoj 'doit reconnaître'. Tiel 'doit' kiel ankaŭ 'reconnaître' havas plurajn signifojn. 'Doit' povus signifi 'devas'. Ĝi povus signifi ankaŭ 'devus'. 'Reconnaître' povus signifi 'akcepti'. Sed ĝi povus signifi ankaŭ 'rekonii' aŭ 'konsideri'. Malfeliĉe, aperis en la traduko la signifo plej malproksima de la originala intenco. Ho chi minh intencis per sia letero diri, ke Usono devus konsideri difinitajn starpunktojn kiel bazon por la intertraktadoj. Oni ne intencis fari ultimaton. Oni atendis, ke ankaŭ Va-

ŝingtono difinos starpunkton, kiun la kontraŭuloj konsideru.

"Ĉirkaŭ la noktomezo telefonis ambasadoro Goldberg³. Li diris, ke laŭ lia opinio la eldonitaj informoj pri la ĝusta signifo en la letero de Ho chi minh ne ŝanĝis la decidon de Vaŝingtono pri rekomenco de la bombardado.

"Mi demandis, kiam la bombardo rekomenciĝos. "Li respondis, ke la ordono estas jam elsendita."

Interpretistoj

Al la dua ĉapitro de sia libro "Nia propra plej granda malamiko" (Our Own Worst Enemy — W. W. Norton & Co., Inc., 1968) la aŭtoro, William J. Lederer, donis la titolon: La surda-muta usonano. La titolon klarigas jena citaĵo el la paĝo 21.

"Nia tuta militado — tiel politika, kiel armea — dependas de interpretistoj. Oni taksas, ke ni laborigas ĉ. 30 000 vjetnamajn interpretistojn. Interpretiston havas preskaŭ ĉiu usona konsilisto kaj preskaŭ ĉiu armea unuo, kiom ajn malgranda. Nur Dio scias, kiom da ili laborigas la ambasado, USAID, USIS, CIA kaj la diversaj aliaj usonaj organoj.

"Eĉ se tiuj interpretistoj apogas nian aferon kaj estas honestaj, tamen la plimulto estas nekapablaj. Kolegoj miaj kaj mi mem provis interpretistojn tra tuta Suda Vjetnamujo. La plimulto scias maksimume kelkcent vortojn de la angla lingvo. Tial ili ofte ne tute komprenas, kion diras al ili la usonano, kiu dungis ilin. Sed ili scias ĝuste sufiĉe por ion diri en la vjetnama kaj poste iel respondi en la angla — kvankam ofte tio donas al la usonano nur malĝustan respondon al malĝusta demando; aŭ ili rakontas al la vjetnamo, al kiu la usonano parolas, ion alian, ol li efektive diris.

"Nenio mirinda, ke usonaj gvidantoj tiel ofte raportas malĝuste al la usona publiko. Ofte la oficialaj raportoj sendataj al Usono estas bazitaj sur tio, kion rakontis al usonanoj vjetnamaj interpretistoj; kaj estas maleble scii, kiom el ili estas "Vietcong"⁴.

"Eĉ se la interpretistoj estas lojalaj, eĉ se ili diligente studis la anglan, multaj el ili ne estas inteligentaj. Ekzistas en Vjetnamujo populara diraĵo: 'Se en ĉio alia vi malsukcesis, vi tamen povos fariĝi interpretisto por la usonanoj'."

1. Eugene Wyzner, anstataŭanto de la pola ambasadoro ĉe UN, Lewandowski.
2. Jack Valenti, helpanto de prezidanto Johnson.
3. Arthur Goldberg, ambasadoro ĉe UN.
4. Ĉar traduko de tiu ĉi vorto en Esperanton neeviteble enkondukus novajn nuancojn, ni lasas la vorton en la originalo. Cetere, per la publikigo de tiu ĉi ekstrakto ni ne intencas prikomenti la militon mem, sed nur ĝiajn lingvajn aspektojn.

Dan-polaj kontaktoj pri Esperanto-instruado

En Pollando estadis delegacio de la Kleriga Komisiono de la dana parlamento kiel gasto de la pola parlamento — Sejmo. La delegacio interesiĝis ĉefe pri la problemoj de klerigado kaj edukado en Pollando, sed ankaŭ pri la instruado de Esperanto en la polaj lernejoj.

Tiun ĉi demandon levis oficiale la prezidantino mem de la parlamenta dana delegacio, sinjorino Meta Ditzel.

La polaj gastigantoj respondis al la interesiĝo de la dana gasto tre serioze. En la Ministerio por Klerigo kaj Superaĵ Lernejoj okazis speciala konferenco. Partoprenis en ĝi altrangaj funkciuloj de la ministerio kun la direktoro de la departemento por klerigado de plenkreskuloj, fakestro pri la lingvo-instruado en mezaj lernejoj, fakestrino pri la lingvo-instruado en la universitatoj, inspektoro pri la lingvo-instruado de la plenkreskuloj kaj prezidanto de Pola Esperanto-Asocio.

Pri la konferenco informis la pola gazetaro. S-ino Ditzel, kiu ankaŭ mem instruis Esperanton en Danlando, dum la vojaĝo al aliaj polaj urboj (i.a. Krakovo) povis tie vidi la praktikan realigadon de tio, pri kio oni parolis en la konferenco.

Tiu ĉi grava kontakto, sur la ŝtata nivelo, estas dankenda al Centra Dana Esperantista Ligo, kiu petis s-inon Ditzel esplori la demandon kaj informis pri tio Polan Esperanto-Asocion.

Tute aparte valoras mencii, ke — laŭ plej freŝa statistiko — Esperanto nun estas instruata en 91 elementaj, mezgradaj kaj superaĵ lernejoj de Pollando.

Kiam ŝtatestro kiel Ho chi minh verkas diplomatan leteron, ĉu li povas antaŭvidi, kiajn nuancojn ĝi ricevos en traduko?




Partopreno de UEA en la Internacia Jaro de Edukado

La Jaro 1970 estas deklarita "Internacia Jaro de Edukado". La 15-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko komisiis la Ĝeneralan Direktoron de tiu Organizaĵo prepari apartan internacian programon de agadoj por tiu jaro. Efektive, la Ĝenerala Direktoro ellaboris esencan programon kaj en junio, 1969, turnis sin al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj, al interŝtataj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj kun la peto proponi pliajn temojn kaj celojn por tiu agado.

La programo akcentas la fakton, ke ankoraŭ ekzistas profunda abismo inter la realo kaj idealo ankaŭ sur la kampo de edukado. Unuflanke, en multaj landoj ne ekzistas deviga senpaga edukado por ĉiuj infanoj eĉ sur elementa nivelo; aliflanke, en la plej evoluintaj landoj ĉiam pli multaj studentoj ribelas kontraŭ malbona instruado kaj kadukaj instrusistemoj.

En 1970 ankaŭ UEA partoprenos la mondan kampanjon por atentigi pri la mankoj de la nuntempa edukado, unuavice rilate la instruadon de lingvoj kaj la neceson vastigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj.

Per sia letero de la 25-a de junio, 1969, UEA komunikis al la Ĝenerala Direktoro de Unesko sian programon por la IJE. La ĉefaj punktoj estas: 1. studoj kaj esploroj pri edukaj demandoj en diversaj landoj, precipe koncerne la instruadon de fremdaj naciaj lingvoj kaj de Esperanto; 2. informoj pri la



Ĉi tiuj infanoj en Kameruno ne povas ricevi edukon en sia gepatra lingvo, sed devas lerni per la franca, la lingvo de iliaj blankaj samklasanoj. Nun, ili ridas gaje. Sed ili postrestos la aliajn lernantojn.

materialoj de Unesko koncerne edukadon kaj publikigo de tiuj informoj pere de la periodaĵoj kaj bultenoj de UEA; 3. dokumentoj pri la eduka valoro de Esperanto-instruado en la lernejoj; 4. kunlaborado de la landaj Esperanto-asocioj kun la naciaj Unesko-Komisionoj, se efektive ili estos aktivaj sur tiu kampo; 5. konferencoj aŭ kunvenoj pri eduktemoj, prizorgataj de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj aŭ de ILEI (la unua el tiuj planitaj konferencoj — pri la vastigo de la Esperanto-instruado



NOVAJ PERSPEKTIVOJ

Ekzistas nuntempe en la mondo miloj da aŭtomobilistoj, kiuj scipovas Esperanton. Tiu konscio instigis la Internacian Esperanto-Klubon Aŭtomobilistan (I.E.K.A.), trovi novajn organizajn rimedojn por kunigi tiujn potencialajn fortojn kaj, iom post iom, enpenetri la ne-esperantistajn fakajn mediojn.

Ja, post kvarjara intensa agado de la klubo evidentiĝis, ke la membronombro nekontentige kreskis, kaj, krome, bedaŭrinda malsano de la senlaca prezidanto Maurice Jaumotte malhelpis lastatempe pluan progresigon.

Uzante motor-terminojn, oni povus diri, ke la piŝto de I.E.K.A. troviĝis ĉe morta punkto kaj samtempe rajpis la krankŝafto.

Dum la 54-a U.K. en Helsinki dufoje kunvenis la membraro de la klubo por forigi tiun paneon

La efika reklamado de FIAT en Esperanto sufiĉe rekomendas la laboron de Giuseppe Grattapaglia, propaganda fakulo de la itala entrepreno kaj la nova motoro de IEKA.

**Ĉiam pli multaj infanoj postulas klerigon
pri ĉiam pli multaj studobjektoj. Ĉu en
la nuntempa mondo la instruado de pluraj
fremdaj lingvoj havas sencon?**

en la lernejoj kaj universitatoj — jam okazis en Helsinki la 3-an kaj 4-an de aŭgusto 1969); 6. ekspozicioj pri edukaj temoj (la unua okazis en Budapeŝto, en majo 1969, aliaj okazos en 1970); 7. prizorgo de prelegantoj pri edukaj problemoj pere de ILEI; 8. utiligo de la simbolo de la IJE; 9. apogo al edukaj projektoj per la donackuponoj de Unesko kaj la skemo de librodonacoj organizita de UEA.

Per sia letero de la 25-a de julio, 1969, la ĉefo de la Speciala Grupo de Unesko por la IJE esprimis sian aprezon por tiu speciala agadprogramo de UEA. En la periodaĵo de Unesko "International Education Year 1970", n-ro 3, 1969, aperis preskaŭ komplete la programo de UEA. Tiu periodaĵo estas sendata al ĉiuj edukaj instancoj de la mondo.

Programeroj en Vieno

Plenumante sian parton de la programo, la Estaro de UEA decidis, ke la Dua Ĝenerala Kunveno de la UK en Vieno pritraktos la temon "La Internacia Lingvo kiel Instrumento por Eduko al Internacia Konceptado de la Mondo". Aliaj kunvenoj kaj parto de la prelegoj de la Internacia Somera Universitato estos dediĉitaj al edukado. Tri el la temoj elektitaj por la oratora konkurso celas malfermi vastan diskuton pri la ribeloj kaŭzataj de diversaj mankoj en la nuntempa edukado. La temoj estas: "Ĉu Antagonismo inter Lerneja kaj Eksterlerneja Edukiĝo?"; "Aŭtoritatismo, Demokratio aŭ Anarkio en Lernejoj"; "Ĉu la Lernejoj Edukas la Junularon por la Estonteco?". UEA petas ĉiujn landajn kaj lokajn Esperanto-organizaĵojn diskutigi



la samajn aŭ similajn temojn en siaj debatoj, oratoraj konkursoj kaj similaj aranĝoj en 1970. Estus vere dezirinde, ke en ĉiuj landaj kongresoj en 1970 okazu oratoraj konkursoj por la junularo pri la samaj temoj. La unua premio povus esti financa subvencio al la venkinto por partopreni la oratoran konkurson de UEA dum la UK en Vieno. Tio ne nur helpus la realigadon de la programo de UEA por la IJE, sed ankaŭ vigligus la programojn de la landaj kongresoj kaj certe altigus la nivelon de la oratora konkurso en Vieno.

I.L.

POR AŬTOMOBILISTA AGADO

kaj starti surbaze de originala organiza formo, kiun sinteze esprimas la nova statuto akceptita dum la kunvenoj mem.

Per unufoja kotizpago de egalvaloro de 4 gld., la aŭtomobilistoj, kiuj jam uzas la Internacian Lingvon aŭ kiuj agnoskas ĝian utilon, fariĝas membroj de I.E.K.A. Ili ricevas la klub-insignon gluotan sur la aŭton, kaj ilia nomo eniras la adresaron de la klubo. Ilia nura devo estos sciigi la eventualajn translokiĝojn, por ke ĉiumomente la adresaro estu ĝisdata kaj taŭge utiligebla.

Paralele, la klubo instigas la membrojn fariĝi fak-delegitoj de U.E.A. por aŭtomobiloj kaj SOS-Servo, kaj la kresko de tiu reto (kiu jam nun ampleksas 14 landojn), plimultigos la okazajn praktike utiligi ĝin. Alia realigenda celo de I.E.K.A. estas la definitiva eldono de "Aŭto-Terminaro", iniciatita de s-ro Jaumotte kunlabore kun diverslandaj fakuloj.

Do, ĉi-foje de la esperantistoj oni ne postulas monon sed nomojn. La aliĝkotizo de 4 gld. estas


ja dumviva kaj preskaŭ simbola, sed la nomoj — miloj da nomoj — estos nia forto por efike proponi nian solvon de la lingva problemo en la tutmondaj aŭtomobilistaj medioj.

☆

La korespond-adreso de I.E.K.A. estas ĉe s-ro Giuseppe Grattapaglia, Via O. Vigliani 15/10, 10135 Torino, (Italujo).

- BRITUJO: J. Brownlee, Sunnyside Gardens 20, Upminster RM14 3DS.
- DANLANDO: S. Andr sen, Vibevej 1, Haderup, 7800 Skive.
- GERMANUJO (FRG): R. Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld.
- JUGOSLAVIO: J.  lat, Djure Jaksica 23/II, Zagreb.
- NEDERLANDO: M. Koopmans, Verl. Oosterweg 26, Groningen.

William Auld



Kio estas lingvo?

Pri tiu punkto Prof. Gifford² ne havas dubojn: "La kulturon oni ne povas disigi disde ĝia ĉirkaŭaĵo" (=

- 6 /
- esperanto, januaro 1970**



W. Auld:
"Lingvo kaj kulturo estas nedisigeblaj"

geografia loko). Laŭ li, estas erare paroli pri "nacia karaktero", kiu estas fikcio; sed li kredas pri alia utila fikciaĵo: "la spirito de la loko". Pli-malpli egaligante la konceptojn pri kulturo kaj lingvo, li diras, "La genio de iu lingvo travivos socian ŝanĝigon, sed ĝi ne travivos translokigon. Ĝia indiĝena tono dependas de la loko, kie oni parolas ĝin, de la natura fono ne malpli ol de la homa etoso". Subtene al tiu unuavide surpriza, sed tre valora, konstato, li citas diversajn verkistojn (usonajn, rusajn, k.a.), kies verkoj estas firme radikigitaj en la geografia kaj lingva fono de la koncerna verkisto. Tamen notindas, ke oni povas citi aliajn verkistojn, pli kosmopolitajn, kiuj verŝajne subtenas tezon malan; malgraŭ tio, en lia troviĝas iom da vero; verŝajne ne tiom, kiom kredas la profesoro mem.

Eĉ li mem rekonas interesajn esceptojn. Pri la skota poeto Hugh Macdiarmid, ekzemple, li diras: "La kazo estas tute alia, kiam la komunumo estas jam malfermita al pli potenca kulturo de ekstere. Hugh Macdiarmid, kiu deziras rekapti la indiĝenan idiomon per skotaj versaĵoj, fariĝas, laŭ John Speirs³, 'trista kaj izolita figuro'. Eĉ la lasta skota poeto, kiun oni taksas vere nacia, Burns, malhavis la potencon eŭropecan senton de Dunbar dum la malfrua mezepoko. Do kiam Macdiarmid eldonis sian sloganon 'Ne Burns, sed Dunbar!', li starigis al si neeblan taskon. Jam tro longe la skotan lingvon surtretis homoj kiel Boswell, kies sola deziro estis paroli iun 'korektan' anglalingvon nemakulitan de skoteco. Kune kun la lingvo, kiel Speirs prave diras, 'detruigis..... aparta tradicia vivo'. Estas vane supozi, ke vivantan skotan poezian lingvon oni povas kunmeti el provincaj anguletoj kaj malnovaj vortaroj. La skota poeto hodiaŭ ne havas alian elekton ol verki anglalingve..... Speirs ne dubas, ke travenos nacia tono, se verkisto 'posedas la honestecon de genio'. Iu ajn klopodo al intencita 'skoteco' lezas tiun honestecon."

La "supernacia" angla lingvo

Tio signifas ke, laŭ la pluaj vortoj de prof. Gifford, "oni povas aldoni nacian akcenton al lingvo, kiu fariĝis supernacia". Li pensas, evidente, pri ekzemple la "supernacia" angla lingvo, al kiu aldoniĝas "naciaj akcentoj" en Usono (ja pluraj!), Skotlando, Irlando, Kimrujo, Aŭstralio kaj tiel multe plu, depende de la geografia loko. Kaj evidente tio estas prava, kvankam oni eble preferas konkludi, ke tio devenas de la sociaj kondiĉoj pli ol de la geografia naturo de la koncerna loko. Oni tamen ne konfuzu la "nacian" akcenton kun la problemo de "dialektoj": estas evidente, ke ne pri lingvistikaj dialektoj pensas la profesoro. Li pensas pri ia "nacia tono", kaj tio substrekindas, ĉar tre multaj estas la homoj, kiuj efektive trovas tiun nocion kerna al la lingva demando. Ankaŭ al la nacia demando, kompreneble. Nacia tono de la nacia lingvo, oni diras, devenas de la nacia kaj lingva tradicio: "Tradicio manifestiĝas al la orelo per aparta tono, ne ĉiam rekonebla de la alilandano. Kiam iu tono persistas malgraŭ multaj historiaj ŝanĝigoj, oni nepre rajtas konkludi, ke tradaŭras io simila al spirita identeco" (Gifford). Malgraŭ la malprecizeco de la terminaro, en tiu aserto sendube troviĝas minimume unu konkreta veraĵo: estas



L. de Beaufront:
"Esperanto estas nura lingvo kaj nenio pli"

preskaŭ neeble, funde propriigi al si fremdan nacian lingvon.

Do estas akceptite, ke ekzistas forta ligo inter lingvo kaj nacieco; inter tradicio, lingvo kaj nacieco; inter tradicio, kulturo, lingvo kaj nacieco. Kiam ajn oni esploras la lingvan problemon, oni neeviteble enretiĝas en la maŝojn ne nur de la lingva diverseco, sed ankaŭ de la forta nacieca emociaro kaj de la limoj de siaj naciaj tradicio kaj kulturo! Gardu sin tiu, kiu parolas malestime, aŭ nur ŝajne malestime, pri iu ajn faceto de tiuj sanktaj juveloj⁴! Sed la rezulto estas, ke diskuto pri la lingva problemo tro ofte malhavas la necesan objektecon, pro entrudiĝo de sentoj superfluaj al la diskuto. Oni ĵaluze konservas sian lingvan unikecon:

"Oni povas diri ke, dum la lingvoj de la mondo hodiaŭ senĉese lernas unu de la alia kaj renkontiĝas en komunaj spertoj, ili ankaŭ ĵaluze insistas pri siaj unikecoj. La patrina lingvo⁵ povas akcepti stifinfanojn*, iun maloftan Joseph Conrad⁶; sed oni devas gardi ĝin kiel propran al ni mem, kaj certamaniere nekomunikeblan. Ĝi devas konservi nian proprecon, niajn tradiciajn emfazojn kaj rezervojn; la privateco de la individuo ligiĝas al la intimeco de la lingvo. Neniu alilandano iam kapablas penetri ĉiujn kaŝangulojn de iu lingvo, sed li eble lernos rekoni ĝiajn karakterizajn modulojn kaj kapti ĝian intonacion" (Gifford).

En ĉio ĉi, kompreneble estas multe da vero. Se do ni resumas, laŭ la supraj konstatoj la ĝenerale akceptitan, kaj ankaŭ ĝenerale korektan, lingvoteorion, ni atingas jenajn konkludojn:

(1) La homon kreis lia kulturo. (2) Kulturo dependas de lingvo. (3) Kulturo kaj lingvo dependas de loko. (4) Ĉiu lingvo havas spiritan identecon kaj tonon, efektive nacian, kiujn alilandano neniam sukcesas propriigi al si.

Kultura unulingveco

Al tiuj kvar konkludoj mi mem nepre aldonas kvinan, same gravan kaj ne malpli fundamentan: ĈIO ĈI SUPOZIGAS KULTURAN UNULINGVECON!

Ĝis kia grado do Esperanto konformiĝas al tiu teorio? Se ĝi estas nura lingvo kaj nenio pli, ĉu ĝi estas tia sama lingvo, kia la ceteraj?

Se la homon kreis lia kulturo, tio validas ankaŭ por la esperantistoj. Se mankus al Esperanto ĉia kulturo, ĝi ne plu respondus al la kriterioj de lingvo; se kulturo dependas de lingvo, la lingvo siavice dependas de la kulturo, de kiu devenas ĝiaj formoj kaj esprimoj. Se kulturo kaj lingvo dependas de loko, de kiu loko dependas Espe-

-
- * Stifinfano = infano de antaŭa edz(in)o.
- John Speirs: "The Scots Literary Tradition; an Essay in Criticism". Londono, 1962. (Unua eldono, 1940.)
 - Inter esperantistoj oni renkontas tion ĉi, ĉiufoje kiam oni volas diskuti la transskribadon de propraj nomoj!
 - Ho kia patosa kaj emociplena esprimo, per kiu oni flankenlasigas multajn gravajn demandojn!
 - Polo, kiu fariĝis grava figuro en la angla literaturo per multaj anglalingvaj romanoj.


KOMUNA LINGVO - LA JAPA

L. Shelton Allen

La pretendoj de la angla kaj franca lingvoj, funkcii kiel komuna lingvo por internacia uzo, estas pli ol sufiĉe konataj. Malmultaj scias, ke ankaŭ aliaj naciaj lingvoj disvastiĝis sur vastan teritorion kaj en la praktiko servis aŭ ankoraŭ servas en tia rolo. L. Shelton Allen havas sperton tiel pri la angla kiel ankaŭ pri la japana kiel "internacia" lingvo. Al lia artikolo ni aldonis porinforme kelkajn faktojn pri la disvastiĝo de la japana.

EN RJUKJUOJ

Mi estas denaska parolanto de la angla lingvo. Sed mi ne povas kredi, ke ĝi fariĝos la internacia lingvo, komuna por ĉiuj. Ĝi estas malfacila, nelogika lingvo. Multe pli bona lingvo, laŭ mia opinio, estas la japana. Ĝi estas bonega kaj riĉa lingvo, nuancoplena, belsona, kaj kun tre altnivela literaturo. Krom tio, ĝi jam estas iom "internacia".



Kultura tradicio kaj Esperanto

ranto? Tre certe ne de la nacio, unuavice. Esperanto estas unika en tio, ke al ĝia kulturo kontribuis homoj el efektive ĉiuj mondpartoj, kaj de la plimultaj nacioj. La granda rolo de la tradukoj en Esperanto diferencigas ĝin kvante de ĉiu alia lingvo; sed ankaŭ ĝia originala literaturo, tiu indiĝena frukto de la Esperanta "nacieco", estas unika. Se ni prenas la Esperantan Antologion kiel mikrokosmon de la Esperanta kulturo, ni konstatas, ke en tiu volumo tre maloftaj estas tiuj poemoj, kiuj per iu nomo aŭ aludo rivelas la naciecon de la poeto — kaj certe oni ne povas pretendi, ke la poemoj en tiu antologio baze dependas de la lokaj cirkonstancoj de la diversaj verkintoj. Tute klare, se Esperanto havas spiritan identecon, ĝi ja ne povas esti nacia pro la fakto, ke la esperantistoj estas tutmondaj kaj iliaj "patrinaj" lingvoj estas absolute diversaj. Estas evidente, ke la "loko" de Esperanto estas la tuta terglobo.

Por decidi ĉu, malgraŭ la teorioj, kiujn mi elmetis supre, Esperanto estas lingvo, necesas decidi, ĉu ĝi posedas "spiritan identecon kaj tonon"; ĉu ĝi estas alproprigebla — ĉar la koncepto "alilanda-

noj" estas sensignifa ĉi tie — de homoj el ĉiuj nacioj; kaj ĉu ĝi posedas propran kulturon, kiun ĝi vartas, kaj de kiu ĝi dependas. Neniu esperantisto povas dubi pri la fakto, ke laŭ ĉiuj tiuj kriterioj, Esperanto estas plenrajte kaj en ĉiuj rilatoj unu lingvo. Niaj problemoj komenciĝas de la fakto, ke multaj neesperantistoj tion ne kredas.

Kaj estas grave konstati, ke laŭ unu grava vidpunkto Esperanto efektive malsimilas ĉiujn aliajn lingvojn, nome: PER SIA EKZISTO MEM ĜI SUPOZIGAS KULTURAN DULINGVECON. Tia ebleco estas fremda al la plimultaj lingvistoj, kaj eĉ al la plimultaj homoj, ĝuste ĉar la nacilingva teorio baziĝas sur la graveco de loko, kaj la homo ja evidente ne kapablas spirite loĝi en pli ol unu loko samtempe; kaj, se la kulturo efektive dependus de loko, tiam dulingva kulturo estus neebla. Sed Esperanto ne dependas de loko; kaj efektive ŝajnas al mi, ke ankaŭ la naciaj lingvoj ne dependas de loko, sed jes de la socia medio; kaj socia medio, kiu spirite ampleksus la tutan mondon, nature rezultigus — kiel ja fakte okazis pri Esperanto — tutmondan kulturon. Estas evidente, ke homo kapablas posedi samtempe kulturbazon nacian kaj kulturbazon tutmondan, kondiĉe ke en la tuta mondo estas homoj, kiuj dividas kun li tiun saman tutmondan kulturbazon! Kulturo estas fundamente komuneco de konceptaro, kaj tion oni ofte

Rolo interdialekta

Dum mia loĝado en Oriento dum la lastaj dek ok jaroj, mi ofte parolis kun koreoj kaj ĉinoj per la japana, eĉ malofte kun francoj aŭ germanoj, kiam ne estis inter ni alia komuna lingvo. Jes, la japana estas komuna lingvo por multaj personoj, sed ni nepre mirus, se iu dirus, "La japana estas LA Komuna Lingvo".

Antaŭ kelke da monatoj mi havis tian sperton, dum vizito al la Rjukju-Insuloj. La Rjukjuanoj ricevas instruadon en la lernejo per la japana, kaj por la plimulto ĝi estas la hejma lingvo. Baldaŭ la Insuloj apartenos refoje al Japanujo. La instruistoj en la lernejoj konsilas al la lernantoj ne uzi la Rjukju-dialektojn, por ke ili fariĝu spertaj kaj fluparolaj en la japana. Sed tamen, la dialektoj ankoraŭ vivas, kaj multaj maljunuloj scipovas paroli nur dialekte.

Mia vizito estis al la Jaejama-grupo de la Rjukju-Insuloj. Kiel kunvojaĝanton mi havis junulon de la ĉefa insulo de Okinaŭa. La Okinaŭaanoj "tute ne" povas kompreni la dialektojn de la Jaejamaanoj, kaj la Jaejamaanoj "komprenas, sed ne parolas" la dialekton de Okinaŭa. Do, mia kunvojaĝanto, kvankam naskita en la samaj Rjukju-Insuloj, estis kvazaŭ alilandano, samkiel mi. Li mem diris: "La japana estas la komuna lingvo". Kompreneble mi — esperantisto — miris pri tia vortuzado.

Multaj "komunaj lingvoj"

Ekzistas ja multe da "komunaj lingvoj" en tiu senco de la vorto. En tiu senco, kaj ne en alia, mia gepatra lingvo, la angla, estas komuna. Ko-

muna por iuj, sed ne por ĉiuj. Praktika kaj uzebla — por mi kaj ili. Sed ne por aliaj. Ankaŭ la japana estas grava lingvo, aktuale uzata kiel komuna lingvo en diversaj partoj de Oriento. Sed ĝi apartenas ĝisfine al la japanoj kaj rjukjuanoj, neniam al la ĉinoj aŭ koreoj. Por la japanoj, ĝi estas ilia propra lingvo. Por mi, la angla estas mia propra lingvo. Naciaj lingvoj neniam apartenos al la tuta mondo. Neniam povas esti. Kaj neniel rajtas esti.

Sed kion ni povas diri pri Esperanto? Mi povas fieri, ke ĝi estas mia lingvo, kaj kantas "Esperanto estas la lingvo por MI". Sed ankaŭ japanoj tiel kantas, kaj ĉinoj, koreoj, eŭropanoj, kaj la loĝantoj sur la tuta terglobo. Ĝi estas NIA lingvo.

Mi tre ŝatas nomi Esperanton "NIA lingvo". Ĉu ne ankaŭ vi?

L. Shelton Allen

ALILOKE

En Koreujo — kiu estis kolonio de Japanujo dum 36 jaroj ĝis 1945 kaj kie tiutempe la japana registaro altrudis la japanan lingvon al la koreoj, i.a. malpermesinte la eldonadon de ĵurnaloj en la korea lingvo — estas nature, ke en pli-ol-mezaĝaj tavoloj ankoraŭ nun estas ne malmulte da homoj, kiuj povas paroli la japanan lingvon. Tiutempe — laŭ vortoj de koreoj — ilia historio devis esti tiu de Japanujo, kaj ilia lingvo devis esti la japana Lastatempe, la korea registaro malpermesis al siaj ĉefaj oficistoj paroli la japanan lingvon en la oficialaj renkontiĝoj kun japanoj.

nomas ideologio: ĉu la esperantistoj ne posedas komune kelkajn konceptojn, kiuj kune formas iun ideologion?

En nian atingopovon

Estas vere, ke nur en tre maloftaj okazoj Esperanto estas ies "patrina" lingvo: sed ni rajtas demandi, ĝis kia grado tio gravas? Tiu patosa esprimo kaŝas la fakton, ke nur tre primitivajn nociojn ni ricevas, kiel infanoj, de la hejma medio. Preskaŭ ĉio, kion oni ordinare komprenas sub la nocio "kulturo", oni ricevas per *edukado*, t.e. per konscia kaj ne (kiel la esprimo volas kredigi) subkonscia doktrinigo. Nur la grandega, kaj reala, malfacileco de la lingvoj malhelpas la alproprigon ankaŭ de dua kulturo; la relativa facileco de Esperanto signifas, ke tia alproprigo venas en la atingopovon de la homa menso.

Gifford liveras al ni alian tre gravan konstaton, kiun ni devas akcepti kaj pripensi: "Ne pli ol unu sola lingvo — tiu per kiu ni vivas kaj pensas — povas esti por ni plene vivanta. Ni devas kontentiĝi per nura formala kaj literatura scio pri aliaj". Denove tiu unulingvisma premiso! Tamen la kerna penso validas: **la lingvo per kiu ni vivas kaj pensas!**

Por la plimulto el ni Esperanto estas nur de

tempo al tempo la lingvo per kiu ni vivas: en niaj kongresoj, niaj grupoj, niaj amikaj rondoj; tamen tiuj tempoj estas realaj ne malpli ol niaj ceteraj spertoj. Por tre multaj esperantistoj Esperanto neniam vere fariĝas la lingvo, per kiu ili pensas; tiam ili restas ĉe la stadio de alilandano, kiu klopodis proprigi al si fremdan nacilingvon. Tamen por tre multaj homoj en ĉiuj mondpartoj Esperanto fariĝis dua lingvo, per kiu ili pensas: kaj tiuj homoj, jam tre multaj kaj inter ili multaj tre talentaj kaj kleraj homoj, rekonas la spiritan identecon kaj tonon de Esperanto.

Tia rekono per si mem ne estus pruvebla, tamen, se ne ekzistus la konkretaj atingaĵoj de la kulturo. Ekzistas specife Esperanta kulturo, sendependa de la naciaj kulturoj. Ĝi ekzistas en la literaturo de Esperanto, ĉu beletra, ĉu scienca, ĉu filozofia. Al tiu literaturo kontribuis pluraj generacioj, el pluraj — efektive multegaj — nacioj; kaj el la fandujo venis io aparta, io propra, samkiel en la fandujo de Usono kreiĝis kulturo specife usona⁷, al kiu kontribuis homoj el multaj nacioj.

La koncepto de "loko" estas nur rekono de la socia aparteno de la homo kaj de la socia faktoro

7. t.e., kun "nacia akcento" specife usona, kompreneble!


Komuna lingvo - la japana

En Tajvano — kiu estis kolonio de Japanujo dum 51 jaroj ĝis 1945 — la japana lingvo estas ankoraŭ nun sufiĉe bone konata lingvo. Japanaj filmoj kelkfoje prezentiĝas sen traduko.

En regiono sur montaroj en la meza parto de Tajvano pluraj triboj havas siajn lingvojn, kiuj malsamas de la ĉina lingvo kaj ne similas unu al aliaj. Kiam anoj de malsamaj triboj renkontiĝas, ili ofte uzas la japanan lingvon kiel la komunan, kvankam en la oficialaj kazoj tio estas tabua.

Ĝenerale nur pli-ol-mezaĝaj homoj bone konas la japanan. Tamen, laŭ la nuna aspekto, ĝi ŝajnas havanta forton ankoraŭ iom longe vivadi, pro la faktoj, ke ekzemple juna sekretario de vilaĝeto lernas la japanan lingvon por siajn taskojn plenumi kaj ke multaj el la juna generacio nun volonte lernas ĝin sur kampoj de turismo kaj ekonomia kunlaboro kun japanoj.

En Mikronezio — Post la dua monda milito Usono enmiksitis sin en Mikronezion por enkonduki la uson-anglan lingvon kiel la komunan inter la malgrandaj insuletoj, kie diversaj etnaj lingvoj estas parolataj. Tamen, ĉar tie la japana lingvo estas plej ofte parolata inter malsamaj etnaj grupoj, usonanoj esploris statistike, ĝis kioma grado la japana lingvo penetris en Mikronezion, intertempe plue instruante la uson-anglan lingvon. (laŭ "Asahi Ŝimbun", Tokio, 12.6.66)



Du generacioj en Rjukju-Insuloj: la infanoj lernas per la japana lingvo, kiun la pli aĝa generacio ofte ne scias.

Statistiko pri mikronezianoj, kiuj parolas aŭ la uson-anglan aŭ la japanan lingvon (1965):

Aĝo	Nombro	Angla (%)	Japana (%)
5-14	18 039	12,0	2,4
15-24	10 307	56,2	11,9
25-44	16 328	25,6	59,8
45-	11 999	19,6	33,2
Sume	56 673	25,6	27,2

Kultura tradicio kaj Esperanto

en lingvoj. La socia aparteno de la esperantistoj ne estas nacibazita, sed tutmonde bazita, ne geografie sed spirite, eĉ ideologie.

Kultura dulingveco

Ni rajtas konkludi, ke Esperanto, havante propran kulturon, spiritan identecon kaj socian apartenon, plenumas la kriteriojn de unu lingvo. Sed ĝi malsimilas ĉiujn aliajn lingvojn en tio, ke ĝiaj ecoj ne estas nacie bazitaj, kaj ĝi baziĝas sur kultura Dulingveco.

Esperanto estas nura lingvo kaj nenio pli. Pli precize, ĝi estas aŭ lingvo, aŭ nenio. Ĝi ne bezonas esti pli ol lingvo nura: kiel lingvo ĝi estas jam multe pli, ol la limigita vidpunkto de Beaufront konceptis per tiu vorto. Lingvo kaj kulturo estas nedisigeblaj. Esperantisto, kiu ignoras aŭ bagateligas la kulturon, kiu estas iasence lingve nia savŝnuro, restas ĉe la nivelo de alilandano babilanta fremdan lingvon. Pli grave, li subfosas la tutan koncepton pri internacia lingvo.

NEKROLOGOJ

ERHARD URBAN

Forpasis la 24an de junio 1969, 83-jara, en Vlastějovice (Ĉeĥoslovakujo), s-ro Erhard Urban, iama delegito de UEA kaj aŭtoro de "Gastronomia Terminaro" (1958). Li lernis la lingvon jam en 1903.

WALTER RANFT

Mortis 77-jara la 28an de septembro s-ro Walter Ranft, el Radebeul apud Dresden, iama delegito de UEA. Lian cindrigon akompanis Esperantlingva preĝo.

IONANIS KALOUMENOS

Forpasis en novembro unu el la ĉefaj pioniroj de la greka Esperanto-movado, s-ro Johano Kaloumenos. Malnova membro de UEA, li fariĝis delegito en 1951 kaj komitatano en 1967. Sur landa nivelo: li estis nomita honora prezidanto de Helena Esperanto-Asocio kaj prezidanto de Helena Esperanto-Instituto. Multfoje li salutis la Universalajn Kongresojn nome de Grekujo.





"Skizo por la erotiko moderna", tradukita de Tyburcjusz Tyblewski el la pola originalo, gajnis lastjare la duan premion de la Belartaj Konkursoj en la kadro de la tradukita poezio. En 1967, la poemo "La rakonto pri maljunaj virinoj" de la sama poeto Tadeusz Różewicz, tradukita de la sama tradukinto Tyblewski, gajnis en la Belartaj Konkursoj la trian premion. La poeto Różewicz (foto: maldekstre), kiu naskiĝis en 1921, aktivas ĉefe en la kampoj de poezio kaj teatraĵoj. Liaj verkoj estas jam tradukitaj en plurajn lingvojn.

Skizo por la erotiko moderna

Ja la blankecon
plej bone priskribi per grizo
birdon per ŝtono
heliantojn
vintre

intaj erotikoj
estadis priskribo de **korpo**
— ili priskribis tion aŭ ion
ekzemple **okulharojn**

ja la **ruĝecon**
oni devus priskribi
per grizo
sunon per pluvo
papavojn novembre
buŝon **nokte**

la plej plastika
priskribo de **pano**
estas tiu de **malsato**



Ilustris I. Kreydzi-Panas

estas en ĝi
humida la pora **interno**
varma interno
heliantoj nokte
mamoj ventro **femuroj** de ulino

la fonteca
diafana priskribo
de akvo
estas tiu de soifo
de cindro
dezerto
elvokas fatamorganon
nuboj kaj arboj enigas
en akvospegulon

Manko malsato
neĉeesto
de **korpo**
estas priskribo de amoro
— ĝi estas erotiko moderna.

Antaŭ 50 jaroj

— en "Esperanto", n-ro jan. 1920

Sekvoj de la alkoholmalpermeso

"Unu el la sekvoj de la alkoholmalpermeso estas la kreskanta uzo de venenaj, narkotaj drogoj. Kvankam ili estis grandkvante detruitaj, opio, morfino, kokaino estas ĉiam troveblaj de boninformitoj sen grandaj malfacilaĵoj." Dirinte tion, d-ro Hamilton en kunveno de la Usona Karcera Asocio konkludis, "Oni almenaŭ permesu la konsumadon de la malplej danĝeraj trinkaĵoj, t.e. biero kaj vino."

La aerveturado je granda alteco

"Hodiaŭ rapideco de 300 km hore estas praktike realigata kaj je kelkaj metroj super la tero." "Sed ĉu oni povos senfine daŭrigi tiun veturon for de nia humila planedo? Ĉu ne estas 'plafono' — nemateria sendube — kontraŭ kiu niaj pilotoj vane frapos per siaj ŝvebiloj?" "Tamen, oni povas antaŭvidi epokon, kiam aviadilo ekflugos de Nov-Jorko, altiĝos ĝis la etera regiono kaj post kelkaj horoj atingos la bordon eŭropan."

Dek pentro-majstroj

Verkoj de Rembrandt, Dürer kaj ok aliaj pentro-majstroj aperas sur kompleta serio de dek nov-zelandaj poŝtmarkoj. Tiu belega serio valoras 6 guldenojn. Ĉe UEA ĝi estas ricevebla kontraŭ nur 3,— gld. Multajn aliajn belajn pentraĵojn ni havas sur poŝtmarkoj. La sola vendokondiĉo estas, ke oni mendu per unu fojo minimume ĝis la sumo de 10 guldenoj. (Malgrandaj mendoj kaŭzas tro da laboro!)

P.S.: Ŝajnas al mi stranga, ke UEA dum la pasintaj ok monatoj ricevis nur kvin mendojn de poŝtmarkoj. Estas certe, ke centoj el niaj legantoj estas filatelistoj, kaj ke miloj da infanoj ĝojus, se ili ricevus donace pakaĵon da poŝtmarkoj kun belaj motivoj: sporto, floroj, bestoj, arstronaŭtiko ktp. Des pli mi miras, ĉar niaj poŝtmarkoj estas pli malmultekostaj, ol ĉe faka vendisto. Kaj ankoraŭ pli, ĉar, aĉetante ĉe UEA, oni kontribuas al la efektivo de la propra celo: progreso de la Internacia Lingvo.

Peter Zacho

INFORMOJ DE

CED CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middx., HA9
8TF, Britujo. Telefono (01) 904 9081.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

18 881 gelernantoj en 691 lernejoj
en la lerneja jaro 1968/69

En la pasintaj jaroj CED plurfoje faris enketojn pri la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj kaj universitatoj. La lasta enketo, rilatanta al la lerneja jaro 1968/69, estis farita komune de CED kaj ILEI. Ĝin entreprenis kaj sukcese finis la kunlaboranto de CED kaj samtempe vicprezidanto de ILEI, rektoro Helmut Sonnabend, kun la helpo de f-ino Karin Ruff. Rektoro Helmut Sonnabend ĵus liveris al CED la rezultojn de sia elstare bona laboro en formo de ampleksa bindita dokumentaro de 126 pj. Ĝi konsistas el Enkonduko, konciza Superrigardo pri la Instruado de Esperanto en la Lernejoj de la Mondo, kaj detala Statistiko laŭ la 31 landoj. En la fino troviĝas Superrigardo pri kursoj en t.n. popolaltlernejoj, lernejoj por plenkreskuloj kaj en kulturdomoj, kiel ankaŭ Superrigardo pri lernejoj, en kiuj Esperanto ne estis instruata en la jaro 1968/69, kvankam pli frue la koncernaj lernejoj instruadis la lingvon.

Kiel en la antaŭaj jaroj, CED intencas eldoni kompletan dokumenton kun ĉiuj detaloj. Ĉi-sube CED publikigas nur la resumajn ciferojn pri la nombro de lernejoj kaj gelernantoj en unuopaj landoj. Oni bv. atenti, ke por ĉiu lando la unua cifero indikas la nombron de lernejoj (inkluzive universitatojn kaj altgradajn), kaj la dua cifero la nombron de gelernantoj aŭ gestudentoj:

1. Argentino 5-167, 2. Aŭstralio 1-25, 3. Aŭstrujo 3-57, 4. Belgujo 5-88, 5. Brazilo 7-356, 6. Britujo 25-1815, 7. Bulgarujo 75-2439, 8. Ĉeĥoslovakio 23-330, 9. Danlando 8-84, 10. Finnlando 3-63, 11. Francujo 43-612, 12. Germanujo 9-143, 13. Gronlando 1-20, 14. Hindujo 1-42, 15. Hispanujo 3-84, 16. Hungarujo 96-1937, 17. Irlando 1-12, 18. Israelo 4-76, 19. Italujo 23-974, 20. Japanujo 38-515, 21. Jugoslavio 35-926, 22. Kanado 1-34, 23. Koreujo 11-388, 24. Nederlando 8-172, 25. Novzelando 25-1318, 26. Pollando 39-1729, (plus poste anoncitaj, sen bazaj dokumentoj, 17-1571), 27. Rumanujo 1-15, 28. Svedujo 2-22, 29. Svislando 3-17, 30. Usono 23-364, 31. USSR 4-110. Entute, do, 543 lernejoj en 31 landoj kun 16 505 gelernantoj. Por ricevi kompletan bildon necesas aldoni, ke en 148 t.n. popolaltlernejoj, lernejoj por plenkreskuloj kaj kursoj en kulturdomoj Esperanto estis instruata al 2 376 gelernantoj. Sekve, la fina cifero estas: 691 lernejoj kun entute 18 881 gelernantoj. Tiuj ciferoj devas esti rigardataj kiel minimumaj, ĉar bedaŭrinde ankaŭ ĉi-foje ne eblis havigi

informojn el Ĉinujo, dum la informoj el kelkaj aliaj landoj ankaŭ ne estas kompletaj.

Por kompari, jen la resumoj de la rezultoj de la antaŭaj enketoj:

En la jaro 1965/66 Esperanto estis instruata en 427 lernejoj de 37 landoj al 16 302 gelernantoj; en 1962/63 la lingvo estis instruata en 563 lernejoj de 32 landoj al 16 272 gelernantoj; en 1959/60 estis 356 lernejoj en 27 landoj kun 13 137 gelernantoj. Necesas, tamen, atentigi, ke la antaŭaj statistikoj ne prenis en konsideron la kursojn en lernejoj por plenkreskuloj.

GRAVAJ LASTATEMPAJ DOKUMENTOJ DE CED

CED regule publikigas ĉ. 24 dokumentojn ĉiujare. En la lastaj semajnoj CED eldonis kelkajn dokumentojn, kiuj meritas apartan mencion. Tri dokumentoj (H/V/3-5) rilatas al Esperanto en PTT. La unua enhavas detalojn pri ĉiuj poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto; la dua entenas liston de ĉiuj oficialaj ŝtampoj; la tria koncernas oficialajn Esperanto-tutaĵojn. Entute, inter 1911 kaj 1967, 10 ŝtatoj eldonis 53 diversajn poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto; inter 1912 kaj 1968 entute 24 landoj uzis 447 oficialajn poŝtajn ŝtampojn; inter 1926 kaj 1967 entute 10 ŝtatoj publikigis 639 Esperanto-tutaĵojn. Tiun grandegan statistikan laboron plenumis por CED s-ro Váňa Vladimír el Ĉeĥoslovakio. — La dokumento C/III/12 estas konciza raporto pri la rilatoj de UEA kun Unesko por la periodo 1964-1969. — La dokumento D/II/17, ellaborita de d-ro V. Sadler, entenas ĉiujn tradukojn publikigitajn en 1968-69. Ĝi estas aranĝita konforme al la sistemo de Index Translationum de Unesko kaj sendita ne nur al la redakcio de tiu publikaĵo, sed ankaŭ al la kompetentaj naciaj instancoj. Provizoran karakteron havas la dokumentoj pri katedroj kaj lektoratoj de Esperanto, kaj pri la juraj eblecoj instrui la Internacian Lingvon en la lernejoj. Baldaŭ estos publikigitaj la definitivaj tekstoj.

UNUA VOLUMO DE LMLP

Per eldono de n-ro 3 de la Monda Lingvo-Problemo, alte prestiĝa revuo eldonata de la mondfama Mouton sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kompletiĝis la unua volumo de entute 192 paĝoj. La revuo pritraktas la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj, precipe socia, lingvistika, politika, jura, psikologia kaj ekonomika. En la unua volumo aperis artikoloj de 14 elstaraj aŭtoroj, pluraj mondkonataj. La redakta komitato konsistas el 12 internacie rekonitaj specialistoj en siaj respektivaj fakoj, kaj la ĉefredaktoro estas d-ro V. Sadler. Fine de 1969 LMLP havis ĉirkaŭ 600 abonantojn, kio estas tre kontentiga por tiaspeca altnivela revuo. Inter la abonantoj troviĝas multaj universitatoj, sciencaj institucioj kaj grandaj bibliotekoj.

LMLP regule aperados ankaŭ en 1970. CED varme rekomendas al ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj, al diversaj informaj centroj kaj al ĉiuj studantoj de la lingva problemoj ne nur aboni la revuon, sed ankaŭ kiel eble plej efike utiligi ĝiajn materialojn por

RECENZO: MODELA PRONONCADO

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo "Esperanto" principe recenzas duope ricevitaĵojn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitaĵojn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur mencias. Nepetitaj recenzoj ne aperas.

Informoj de CED

dokumentado kaj serioza informado. Personoj ofi-
cantaj aŭ laborantaj en universitatoj, institutoj,
bibliotekoj kaj samnivelaj instancoj, instigu ilin al
abono. La jara abono estas 25 gld. aŭ egalvaloro,
kaj oni povas mendi ĉe Mouton & Co., Postbus
1132, Den Haag, Nederlando. Ĝiro: 473.950 (Mou-
ton). Ankaŭ CED, Nieuwe Binnenweg 176, Rotter-
dam-2, peras la abonojn.

Donacoj por CED

Gesinjeroj Laurie, Britujo	4- 0- 0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro Isaj Dratwer, Israelo	6- 6
S-ro Einar Dahl, Svedujo	8- 1
S-ino R. Seddon, Britujo	2- 0- 0
Gesinjeroj Holmes, Britujo	2-10- 0
S-ro N. Rytjkov, Britujo	2- 2- 0
S-ro L. Minnaja, Italujo	5-16- 4
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro E. Burg, Nederlando,	5-10
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0- 0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0- 0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0- 0
S-ro John Kailenta, Usono	4- 4- 7
S-ro P. Saunders, Britujo	3- 0- 0
Novzelanda Esperanto-Asocio	4-13- 4
Gesinjeroj Laurie, Britujo	1- 0- 0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro R. Hjorth, Svedujo	1-12- 8
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro J. P. Jensen, Danlando	1-17- 3
S-ro E. F. Dean, Britujo	40- 0- 0
S-ro E. Burg, Nederlando	11- 8
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	3- 0- 0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-10
S-ro R. Hjorth, Svedujo	1- 2-11
Stato je la 19-a de novembro 1969	£ 104-12- 0

Al ĉiuj donacintoj CED esprimas tutkoran dan-
kon. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA,
ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ la Oficejo de
CED je la nomo de ĝia direktoro.

Recenzas W. Auld (Skotlando):

Esperanto pronunciation disc, de J. C. Wells.
London: BEA, 1969. Disko 45 t/m. Monofona. Du-
flanka. 18 cm. (COUN SP 134-135).

Pro la profesio de s-ro Wells — li estas foneti-
kisto — oni povas esti certa, ke la prononcado sur
ĉi modela disko estas fake korekta kaj imitinda. Tiu-
rilate ĝi superas aliajn diskojn, eĉ faritajn de tre
spertaj kaj belvoĉaj kompetentuloj. Liaj ekzemploj
estas bonege elektitaj, tute aparte ĉe la duoblaj
vokaloj (praavo, heroo, ĝuus) kaj la duoblaj kon-
sonantoj (huffero, subbrake, ekkanti). Pri la malfacile
difineblaj sonoj r kaj l lia varianto estas internacie
imitinda, kaj lia konsilo — sur disko celanta
unuavice anglojn — ke oni prononcu la r iel ajn
prefere ol ĝin tute ne prononci, estas tre saĝa.
Sur la tereno de prononcado, kompreneble, an-
koraŭ neniu plaĉis al ĉiu, kaj por mia orelo Wells
en la vortoj kiuj kaj neniu trolongigas la finan j;
ankaŭ en la vortoj knabo kaj kvin la komencaj k
ŝajnas al mi nesufiĉe senvoĉaj.

Ĉiuj klarigoj kaj konsiloj sur la disko estas ang-
lalingvaj, sed per la akompana teksto ĉiuj homoj
povos sekvi kaj imiti la ĉefaĵon — vere modelan
prononcadon.

Laste aperis . . .

kvazaŭ por bonvenigi la reorganizon de la Inter-
nacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (vidu p. 4),
dua, kompletigita eldono de la "Aŭta terminaro
Esperanta-japana-angla kaj japana-Esperanta-angla"
de Eyama tokiziroo, ilustrita kaj 141-paĝa. De la
sama eldonejo aperis 88-paĝa biografia kompilaĵo
"H. D. Neumann en nia koro", pri la juna germano,
kiu mortis en Japanujo antaŭ nelonge. Ni ricevis el
la sama lando ankaŭ la Kongresan Libron Tokio
1969, pri la 56a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.

Alia nova vortaro estas "Oportuna Vortaro de
Ordinara Esperantisto", verkita de Vilho Setälä,
kun difinoj tute en Esperanto. Laŭ celo kaj stilo ĝi
bone suplementas la lernolibron "Privilegia Vojo".
(La vortaro kostas 3,25 gld.). La alia plej konata
rekta-metoda kurso, tiu de Szilágyi, ĵus atingis
sian kvinan brazilan eldonon (1,20 gld.). Bonvena
reeldono estas ankaŭ tiu de "La junaj detektivoj"
(1,74 gld.), tre ŝatata infanrakonto de J. H. Sulli-
van.

Kiu ne konas la nomon de Carlos Wappers,
povas konatiĝi kun liaj artikoloj, noveloj kaj aliaj
verkoj per la kolekto "La paperoj de Wappers",
komuna eldono de Argentina Esperanto-Ligo kaj
Kultura Kooperativo en Rio. (Libro-klubo, n-ro 2).

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la
prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 %
por sendokostoj.

POST LA „DOLOROJ”

(Vidu ankaŭ la duan kovrilan paĝon)

Por la unua fojo dum mia 40-jara membreco ĉi tiu numero (novembra) alportis senton de forta naŭzo. Mi nevolonte kredas, ke la konkurenco de "Heroldo" estas tiel forta, ke necesas adopti tian stilon por la bonhumoro de la legantoj!

Erik Ekström (Svedujo)

Vi certe rajtas kritiki la redakcion de "Heroldo de Esperanto" pri opinioj en tiu gazeto pri la konduko de la UK kaj aliaj aferoj. Tamen mi taksas kiel treege infanecan la uzon de la kruda satiraĵo "Doloroj de Esperanto".

David Withey (Britujo)

Mi tute ne aprobas numeron 11/1969 de "Esperanto". Mi ne aprobas uzon de mia kotizo por tia celo. Ĉu vi rimarkis, ke grandparte paĝoj 174/175 estas atakoj, ne defendoj, kontraŭ IOE? Oni lasu laboremulajn labori.

Otto Böhm (Germanujo)

... ankoraŭ ridante pro "Doloroj" ...

Jonathan Pool (Usono)

Vi nomas tiun vian produktaĵon "satiro". Sed ĝi ne estas satiro. Ĝi estas specimeno de plej malaltnivela demagogio! Ve al nia movado, se la esperanto-asocio sin nomanta universala ne scias prezenti siajn argumentojn en pli taŭga maniero!

Manfred Führer (Germanujo)

La parodio estas tre malfacila ĵurnalista arto, kiun la redakcio evidente NE regas. Tamen — kaj malfeliĉe — vi kuraĝis agi. La rezulto, kiun oni povas atendi, malpravigos vian iniciaton.

Lucien Giloteaux (Francujo)

Gratulojn pro via trafa ĉefartikolo (kaj humorega centra paĝo) en la lasta revuo!

Paul Peeraerts (Belgujo)

La novembra numero laŭ mia opinio ne akordiĝas kun la alta nivelo, kiun UEA prave postulas por si. La satira aldono estas bedaŭrinda mistrafo.

H. J. Blokker (Nederlando)

Gratulon pro la bona aldono al "Esperanto": "Doloroj de Esperanto". Jam vere alvenis la tempo, por ke UEA diru sian opinion.

László Somlai (Budapest)

Delegitoj laŭdataj

Skribas familio Bartovic (Ĉeĥoslovakujo):

La delegita servo de UEA estas grandioza bonega organizaĵo por ĉiu esperantisto. Mi persone pri tio konvinkiĝis en la pasinta jaro, de kiam mi estas membro de UEA.

En januaro 1969 mi komencis plani rondvojaĝon kun familio trans Francujo, Federacia Respubliko Germanujo, Belgujo kaj Britujo, hejmen al Ĉeĥoslovakujo. Mi faris planon por vizito al urboj Parizo, Londono, Newcastle, Bruselo kaj Frankfurt. Mi skribis al la kompetentaj turismaj delegitoj en ĉiu urbo por certigi malmultekostan tranoktadon kaj peti bezonatajn informojn.

Mi devas laŭdi kun ĝojo, ke ĉiuj delegitoj al mi rapide respondis. Ĉi tiun 4250-km. longan vojaĝon ni realigis, dank' al ĉiuj, kiuj helpis nin per siaj informoj kaj konsiloj.

Pro la lasta numero de la revuo "Esperanto" ni deziras esprimi nian gratulon kaj dankon. Dum longa tempo ni miris, ke neniuj protestis kontraŭ la malsaĝaj kaj malpravaj eldiroj ofte legeblaj en oficialaspekta organo kiel "Heroldo".

Estraro de Dana Ligo de Esperantist-Instruistoj Mi iom malgaje legis la lastan numeron de "Esperanto". Mi komprenas vian vidpunkton; la forto de la reago tamen estis surprizo kaj unuavide aspektas eksterproportia kun la damaĝo. Sed vere estas, ke konstantaj nekonstruaj kritikoj estas danĝero al la koheremo de la movado.

G. Larglantier (Parizo)

"Doloroj de Esperanto" certe estas la plej legata "artikolo" en la revuo "Esperanto" dum jaroj. Tio substrekas la bedaŭrindan mankon de satira Esperanto-gazeto, — ĉar, nur lerninte ridi pri ni mem kaj pri la aliaj "samideanoj", ni estas sufiĉe plenkreskaj por la disvastigo de niaj idealoj.

Torben Kehlet (Kopenhago)

La mokega teksto publikigita sur la centraj paĝoj de "Esperanto" kontraŭ "Heroldo de Esperanto" kaj IOE vekis en mi la plej grandan malŝaton. Mi neniam estus povinta imagi, ke la oficiala organo de UEA iam malaltiĝos al tia nivelo.

Mario Sola (Italujo)

Eĉ se vi pravas, tiaj polemikaj artikoloj donas nur armilojn al malamiko de nia movado kaj ĉiufanke malutilas. Mi amare konstatas, ke en la sama numero estas artikolo pri ... la Semajno de Internacia Amikeco!

A. Frangeul (Francujo)

La du paĝojn "Doloroj de Esperanto" mi tute ne konsentas. Tiuj paĝoj povus trovi lokon en satira gazeto, tute ne en la revuo de UEA.

André Aude (Francujo)

Ke vi simple ĉion ignoras kaj forridigas, ŝajnas same senutila, kiel la atakmaniero de Heroldo. Tamen mi ĝuis la satiron, kaj mi tre ĝojis, ke la revuo finfine forgesis sian dignon.

D. J. F. Quirke (Britujo)

Persone, se mi devus retrovi tiajn klaĉojn en la kolonoj de "Esperanto", mi rapide forlasus kaj UEA kaj la tutan movadon kaj samtempe rezignus ĉian ajn aktivan por Esperanto.

S. Humm (Francujo)

TELEFONLIBROJ

Skribas s-ino W. A. Bakker-Smith (Amsterdam):

Antaŭ du tagoj la firmo Philips en Eindhoven telefone vokis nin. Ili ricevis Esperantan leteron, kiun ili ne komprenis. Ĉar en la telefonlibro de Eindhoven sub "Esperanto" ne estis anoncita iu adreso, al kiu oni povus turni sin, ili serĉis en la Amsterdamo. Ne mirige, ke ne-esperantistoj diras: "Oni nenie vidas ion pri aŭ en Esperanto".

Mi ne povas kompreni, kial Esperanto-kluboj kaj individuoj ne pagas malgrandan sumon ĉiujare por la enskribo en la telefonlibro sub "Esperanto". Ni ricevis el ĉiuj partoj de Nederlando alvokojn pri kursoj, Esperanto-kluboj k.s. Ni volus forte instigi, ke en aliaj urboj oni same presigu nomon, adreson kaj telefon-numeron sub la rubriko E: Esperanto.

Komputiloj

- 30 adresojn de komputilistoj, kiuj parolas Esperanton, kolektis d-ro K. Schlüter, 3167 Burgdorf, H. Kirchweg 20, Germanujo. Li petas aliajn komputilistojn sendi al li siajn adresojn kaj funkciojn por tiu listo, kiun poste ĉiu listano senkoste ricevos.

Kristanismo

- Sub la titolo "Kongreso de Kristanaj Esperantistoj sub aŭspicio de IKUE kaj KELI" kunvenos membroj de ambaŭ eklezioj en Brno, Ĉeĥoslovakujo, de la 24a ĝis la 31a de julio 1970 - t.e. tuj antaŭ la Universala Kongreso en Vieno.

Leksikologio

- SAT informas el Parizo, ke la preslaboroj de Plena Ilustrita Vortaro progresas malpli rapide, ol ĝi antaŭvidis. La Vortaro tial ne povis aperi en 1969, sed aperos en 1970.

P.T.T.

- "Interligilo", la antaŭe multobligita bulteno de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio, ekaperis kiel grandformata revuo ofsetita kaj ilustrita. Adreso: P.K. 25, Sofia, Bulgarujo.

- Okaze de la 25-jara datreveno de la fondo de la Popola Respubliko Bulgarujo, la ministro de komunikado de Latva Soveta Socialisma Respubliko sendis saluton al sia bulgara kolego, ministro Stojan Tonĉev — en Esperanto. La salutojn de ministro A. Aleksandrov reciprokis ministro Tonĉev — same en la Internacia Lingvo.

Sennaciismo

- La 43a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos en Augsburg (Germanujo), urbo, kiu por multaj troviĝas sur la vojo al la kongresurbo de UEA, Vieno. Krom la kutima programo — ekskursoj, teatraĵoj, diskutoj, ekspozicio ktp. — la kongreso de SAT proponas ankaŭ prelegojn de profesoroj Lapenna, Neergaard kaj Waringhien kaj d-ro W. Bormann. Informas: la delegito de UEA en Augsburg.

LOKE**Aŭstralio**

- Pro la kreskanta membronombro de AEA, la organo "The Australian Esperantist" nun jam aperas ĉiumonate anstataŭ 8-foje jare.

Britujo

- La mastro de germana ŝipo, kiu ellasis oleon en Tamizon, devis pagi punon de £ 300 plus kostoj £ 50. Kapitano Brummer informis la kortumon, ke liaj ŝipanoj estis francoj kaj ke ili miskomprenis liajn ordonojn. (Laŭ "Lloyd's List and Shipping Gazette", 22.9.69)

Finnlando

- Esperanto-Asocio de Finnlando aranĝas dutagan internacian renkontiĝon en Turku okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, kun alloga programo kaj kotizo de nur 5 fmk. Datoj: 21-22 februaro 1970. Informas: J. Ahomäki, Piispanristi, Turku.

Hispanujo

- Duonhoran, tutlandan elsendon la Nacia Radio de Hispanujo dediĉis al la temo "Esperanto" en semajna programo "Verdikto" la 3an de novembro.

LOKE — FAKE**Italujo**

- Dektagajn senpagajn restadojn en la marborda urbo Rimini denove ĉi-jare proponas al junaj geedzoj la konkurso "Miela Luno". Oni informiĝu ĉe la delegito de UEA en Rimini.

Nigerio

- La nigeria semajngazeto "The Truth", kiu sin nomas "la unua kaj sola islama gazeto en Nigerio", antaŭ nelonge dediĉis sian frontpaĝon al la novaĵo pri eldono de La Nobla Korano en la Internacia Lingvo.

Soveta Unio

- Ĝus atingis nin informo pri 20-minuta televidelsendo dediĉita al Esperanto, en Ukrainujo, la 10an de majo 1969. La elsendo rezultigis amason da informpetoj pri rimedoj por lerni la lingvon.

Usono

- En januaro komenciĝis televida kurso de Esperanto en okcidenta Massachusetts. La kurson, kiun gvidas la nov-jorka vic-delegito John Lewine, la TV-kompanio elsendas al kvin komunumoj per la kablo-reto. Spektantoj, kiuj sukcesos en ĝia fin ekzameno, povos gajni poentojn por kolegiaj diplomoj.

En la urbodomo de Augsburg (videbla ĉi tie malantaŭ la monaĥinejo Maria Stern) okazos la solena malfermo de la venonta SAT-kongreso, kiel ankaŭ tutsemajna Esperanto-ekspozicio okaze de la kongreso. (Vidu: Sennaciismo)





55-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1 - 8 aŭgusto 1970

Alta Protektanto: Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

La Internacia Lingvo kaj la Internacia Jaro de Edukado

En Vieno okazos du Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, el kiuj la unua pritraktos la estraran raporton kaj aŭdos salutojn de reprezentantoj de la fakaj asocioj, kaj la dua havos la temon "La Internacia Lingvo kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo (okaze de la Internacia Jaro de Edukado).

Akcepto ĉe la Alta Protektanto

Vendredon, la 28-an de novembro 1969, la ŝtatprezidanto de Aŭstrujo kaj la Alta Protektanto de la 55-a UK, d-ro Franz Jonas akceptis la KKS-on, s-ron Mikuláš Nevan, en sia ŝtatestra oficejo en Vieno. La aŭdiencon ĉeestis ankaŭ la prezidanto de LKK, senata kons. d-ro L. Grimme, reg. kons. R. Cech, LKK-sekretario d-ro Scheibenreiter kaj s-ro H. Kraus. Dum preskaŭ 30-minuta konversacio — tute en Esperanto — d-ro Jonas i.a. promesis persone partopreni la Inaŭguron de la Kongreso kaj mem prezenti salutparoladon en Esperanto.

Honora Komitato

Ĝis la finredakto de tiu ĉi komuniko aliĝis al la Honora Komitato de la Kongreso 9 eminentuloj de la aŭstra publika vivo, i.a. la urbestro de Vieno, s-ro Bruno Marek, kaj la ĉefepiskopo de Salzburg, d-ro Eduard Macheiner.

Kun bonhumoro — kaj en facile-flua Esperanto — la prezidanto de Aŭstrujo akceptis KKS kaj LKK-anojn en novembro (vidu supre).

Foto: Hugo Kraus



Oratora Konkurso

Efektive aktualajn (kaj diskutindajn!) temojn elektis la Estraro de UEA por la Oratora Konkurso 1970:

1. Sistemoj.
2. Ĉu antagonismo inter lerneja kaj eksterlerneja edukiĝo?
3. Aŭtoritatismo, demokratio aŭ anarkio en lernejoj.
4. Ĉu la lernejoj edukas la junularon por la estonteco?
5. Kion volas mia generacio.

La Estraro de UEA varme rekomendas al ĉiuj Landaj Asocioj kaj al la landaj sekcioj de TEJO organizi enlandan Oratoran Konkurson kaj instigi la gajnintojn partopreni en la konkurso de la Universala Kongreso. Detaloj aperos en la Dua Oficiala Bulteno.

Kongresaj ejoj

Por la kongresaranĝoj 1970 la LKK jam fikse mendis la Kongresejon en Sofiensäle (Marxergasse 17, Vieno III), la Inaŭgurejon en Stadthalle (Vogelweidplatz, Vieno XV) kaj la Teatro en Raimundtheater (Wallgasse 18-20, Vieno VI).

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien

La Internacia Esperanto-Muzeo en Wien estos senpage vizitebla en la kongressemajno de lundo ĝis vendredo de la 9-a ĝis la 16-a h., sabate de la 9-12a h. Speciala ekspozicio okaze de la 55-a UK kaj modernigita Konstanta Ekspozicio.

Oficialaj Antaŭkongreso kaj Postkongreso

Invitite de lokaj organizaĵoj, la Estraro de UEA decidis aŭspicii la Antaŭkongreson en Bratislava (29.7. - 1.8.1970) kaj la Postkongreson en Linz (8-10.8.1970). Detaloj kaj mendiloj troviĝos en la Dua Oficiala Bulteno).

Pliaj karavanoj anoncitas

Al la jam anoncita flugkaravano el Finnlando, aldoniĝas nove la komuna veturado al Vieno, organizata de la Nederlanda Esperanto-Asocio "L.E.E.N." (f-ino M. H. Vermaas, Nwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-3002, Nederlando), de Japana Esperanto-Instituto (Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio, Japanujo), de la Kongresvojaĝa Sekcio de CDEL (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando), de ELNA (156 Fifth Avenue, New York, N.Y. 10010, Usono) kaj de Brita Esperantista Asocio (140 Holland Park Ave., London W. 11, Britujo).

Limdato por malaltaj kotizoj

Ek de la 1-a de januaro 1970 la aliĝkotizoj estas jenaj:

gld. 1

- | | |
|---|-------|
| 1. Kongresano neindividua membro de UEA | 82,50 |
| 2. Kongresano individua membro de UEA | |
| kun Jarl. | 70,— |
| 3. Kongresano individua membro kun Jarl. | |
| kaj "Esp." | 57,50 |
| 4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1) | 58,— |
| 5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2) | |
| kaj 3) | 48,50 |
| 6. Junulo ĝis 20-jara | 25,— |
| 7. Universitata studento ĝis 30-jara | 41,50 |
| 8. Blindulo | 33,— |

Statistiko

Ĝis la 23-a de decembro aliĝis entute 479 personoj el 34 landoj.

TEJO - PAĜO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Wim Jansen,
Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen,
Nederlando.**

KONTAKTO SERĈATA

Kiam en 1963 ni konsideris, ĉu eldoni luksan junularan revuon, ni frontis grandan riskon. Ĉu la Esperanto-movado vere pretas por tia revuo? Ĉu la gejunuloj subtenos ĝin sufiĉe grandskale? Ĉu ĝi vere plenumos siajn ĉefajn celojn — interne aktivigi niajn homojn, kaj ekstere altigi la prestiĝon de la Esperanto-junularo? La administraj organoj de TEJO longe debatis la aferon, diskutis pri redaktoroj, pri enhavo, pri bezonoj de la Organizo. Ili decidis riski.

Hodiaŭ, la legantoj de "Kontakto" konsideras ĝin institucio. Dum ses jaroj kaj dudeko da numeroj ĝi elruliĝis la presejon. Ĝiaj paĝoj regule spegulis la agadon kaj entuziasmon ne simple de nia junularo, sed de la tutmonda junularo. La artikoloj fidele prezentis la aspirojn kaj problemojn de tuta generacio de mondaj civitanoj.

Sed la "institucia" karaktero de nia kvaronjara revuo estas iaŝence trompa. Malgraŭ la ekstera aspekto, TEJO estas en ŝajne konstanta stato de financa krizo. En la lastaj jaroj ni multe pligrandigis niajn enspezojn (fakte je 2200 procentoj de post 1960), sed niaj burĝonantaj aktivecoj formangiĝis eĉ pli ŝveliĝantan monkvanton. Nin ne obstaklas la kutimaj baroj al pli rapida progreso. Ni ne suferas pro manko de kunlaboremo inter niaj postenuloj, nek pro negativa vidpunkto de la neesperantista

junularo, nek pro neseriozeco de la junaj esperantistoj. Kunlaboremon kaj seriozecon ni havas abunde — kiel atestas la impona amplekso de niaj aktivecoj. Kiam temas pri la vidpunkto de la neesperantista junularo, ĝi estas eĉ pozitiva — kaj pro tio ni havas tre fortan fakon por niaj eksteraj kontaktoj.

Obstaklas, entute, nur manko de mono. Pro tio, la estraro de TEJO decidis lanĉi escepte grand-skalan varbkampanjon. Ĝia celo estas unuavice draste pligrandigi la nombron de legantoj de nia revuo "Kontakto", kaj ankaŭ plimulti la nombron de Patronaj Membroj kaj de junaj individuaj membroj de UEA.

Ni direktas nin al vi. Kiel membro-abonanto de UEA, vi rajtas al enkonduka abono al "Kontakto" kontraŭ nur 5 guldenoj. Viajn geamikojn vi povas varbi aŭ abonigi je la normala kotizo de 8 guldenoj jare aŭ, se ili estas malpli ol 26-jaraj kaj indikas sian naskiĝjaron, kontraŭ 5 guldenoj.

Multaj niaj eminentuloj estis gejunuloj, kiam ili lernis Esperanton. Subtenu, do, la junularon!

AKTIVECO EN ORIENTA EŬROPO

El manpleno da kongresoj, konferencoj, laborbrigadoj, ktp., kiuj tradicie markas la aktivecon de orienteŭropaj sekcioj de TEJO, jen nur konciza elekto.

Bjalistoko (Pollando). Daŭras la preparlaboroj por la **2a Internacia Kulturfestivalo** de Pola Esperanto-Junularo, kiu okazos de la 21-a ĝis la 24-a de julio 1970 en ĉi tiu urbo. Oni preparas i.a. internacian konkurson de originala kaj tradukita poezio kaj prozo. Adreso: PEJ, str. Traugutta 3, Bjalistoko, Pollando.

Torun (Pollando). Tie ĉi okazos de la 25-a ĝis 31-a de julio 1970 la **6-a Internacia Studenta Esperanto-Seminario**, kiu ĉefe traktos: "Lenin kaj la internacia laborista movado". La organizantoj bonvenigas ĉian ekspozicieblan materialon lige kun la semina temo. Adreso: Studenta Scienca Esperanto-Rondo, str. Mickiewicza 6/10, DS II, Torun, Pollando.

TEJO: INTERNACIA KOMUNIKADO

Jen la titolo de nova TEJO-broŝuro, kiu aperis en angla kaj franca lingvoj. Ĉu broŝuro, kiun trafoliu-minte oni kun amaso da aliaj reklamiloj ĵetos en rubujon? Certe alian sorton ĝi meritas!

Laŭ enhavo ĝisdata ĝi informas pri TEJO, tuŝante en apartaj kadroj celojn kaj programojn de la Organizo, donante ankaŭ necesajn faktajn informojn. Tra la diversaj kadroj ni nature alvenas al la lasta, "internacia komunikado", kie Esperanto — alivorte por la hodiaŭa komunikema junularo: TEJO — estas plej urĝe bezonata. Dorsa paĝo dediĉas kelkajn vortojn al Esperanto kaj ĝia penetro en plurajn kampojn de la socio kaj kulturo.

Aspekte ĝi sendube superas ĉion antaŭe aperintan. Resume: alloga eksteraĵo, plaĉa enpaĝigo de aktuala teksto. En la manoj de kapabla informanto tiu ĉi nova TEJO-eldonaĵo ne povas resti sen efiko. Vendas po 0,12 ned. gld.: NEJO-kom. de TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z, Nederlando.

**Tra sesjara evoluo,
ne ĉiam sen
problemoj, la
revuo "Kontakto"
sukcesis sin
establi kiel unu
el la plej allogaj
punktoj en nia
gazetara pejzaĝo.
Kontrasto inter
la unua kaj la
plej nova numeroj
montras klaran
progreson en la
revuado.**





ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1969, Unua Parto, p. 521. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.30-06.00 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs).

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.
20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.
22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua Sao Bento 245, Sorocaba (Sao Paulo), Brazilo.
12.20-12.30 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.86 m (11795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 m Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programoj en la angla).

Merkredo

12.20-12.30 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).
14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.
23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila. Kiel dimanĉe.
21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (1180 kcs), P. (D-ro Baur).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.

Vendredo

20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.
20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.
21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj: — dana merkrede inter 15.30 kaj 15.55 per ondoj 49 m, 41 m, la saman tagon inter 19.30 kaj 19.55 per samaj ondoj, kaj dimanĉe inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs); — germana ĉiutage inter 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs); — sveda marde kaj vendrede inter 20.30 kaj 21.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs), merkrede kaj sabate inter 7.00 kaj 7.30 per samaj ondoj.

RADIO ROMA: 4-I, Tra la literaturo; 11-I, Novaĵoj el Italujo; 18-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 25-I, Leterkesto; 1-II, La fontoj de Clitunno; 8-II, La franca verkisto A. de Musset kaj Italujo; 15-II, Aŭtoŝoseoj en Italujo; 22-II, Andrea Pozzo, la pentristo de la perspektivoj. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

GENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urbo): Muritiba, Rosario, Stoke-on-Trent, Sorocaba, Valencia;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Bilbao (aŭdebla en sudokcidenta Eŭropo), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio: Manila, Pekino, (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

d) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.27 m, 25.25 m, 16.86 m, 13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera situacio, lokaj kondiĉoj diversspecaj.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 430, 1 decembro 1969

NOVAJ ĈEFDELEGITOJ

Hungarujo: Por pliefikigi kaj administri la delegitan reton en Hungarujo, Hungara Esperanto-Asocio decidis nomi Ĉef-delegiton. La nova oficulo estas s-ro Miklós Berényi, Budapest XIII., Radnóti Miklós utca 40. III. 14; tel. 313-656. S-ro Berényi estas membro de la Landa Komitato de HEA kaj sekretario de la Budapeŝta Teritoria Komitato. Al liaj novaj taskoj apartenos ankaŭ la ĝenerala plivastigo de la agado de UEA en Hungarujo.

Ĉeĥoslovakujo: La direktoro de la Centra Oficejo, laŭ rekomendo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, nomis kiel novan Ĉefdelegiton de UEA por la Ĉeĥa Respubliko s-ron František Sviták, Teplická 272/5, Praha 9 — Prosek. S-ro Sviták estas la vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de marto neniun membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Argentino: Julia V. de Rocafull, Florencio-Varela. **Brazilo:** Iracema Kuimarães (FD), Belém; João Fernandes, Coronel Fabriciano; Hermanito Christensen (FD), Curitiba; Joel Manso (FD), Rio de Janeiro. **Britujo:** Ray Smith, Nantwich. **Bulgarujo:** Georgi Idakiev, Haskovo; Svoboda Damjanova (FD), Kazanlak; Dimitr Kjosevski, Kneŝa; Nikola Nikolov (VD), Sofia; Sertov Ivanov (FD), Vraca. **Finnlando:** Pentti Törmälä (VD), Nokia. **Francujo:** Raymond Pons, Pamiers; Eriko Sunardo (FD), Paris. **Germanujo:** Michael Perény (FD), Dortmund; Anni Peschke, Esthal; Ludwig Röhl, Günzburg. **Hungarujo:** Jánosné Ingusz Barabás (FD), Miklós Berényi (FD), Budapest. **Italujo:** Girolamo Lucchetta, Meolo. **Jugoslavio:** Stjepan Crnić, Crikvenica-Grizane; Fikret Halilović, Gradačac; Vjera Baletić (FD), Opatija; Ivo Knaus (FD), Split; Nikola Golić (FD), Trojstvo. **Kanado:** Verner Rolding (FD), Toronto. **Sudano:** Abdelgader Mishaal, Khartoum. **Svedujo:** Iva Aberg (FD), Lennart Aberg (FD), Göteborg; Ivar Runfeldt (FD), Karlstad. **Usono:** Bruce Sherwood, Champaign; Paul Mimlitsch, Marl-

DANKO

Okaze de mia lasta naskiĝtago mi ricevis tiom da kortuŝaj bondeziroj por mi mem kaj UEA, gratuloj, floroj kaj donacoj, ke bedaŭrinde estas por mi fizike maleble danki al ĉiuj unuope. Tial ĉi-maniere mi esprimas al ĉiuj mian plej profundan dankon kaj kore recipokas la bondezirojn.

Ivo Lapenna



ton; Anne Whitteker (VD), Hazel Heusser (FD), John Dahnke (FD), Portland.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Aŭstrujo: Innsbrück. **Brazilo:** Atibaia; Teresópolis. **Francujo:** Bergerac; Tresserre; Villeurbanne (FD instruado). **Germanujo:** Höchstädt; Neu-Ulm; Wetzlar. **Grekujo:** Paleon Faliron. **Jugoslavio:** Kruševac. **Nederlando:** Haarlem (FD PTT). **Nov-Zelando:** Wellington (FD turismo). **Svedujo:** Hagfors. **Usono:** Los Angeles (FD literaturo); San Francisco (FD naturismo) kaj (FD nudismo).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Bagger, s-ro P. V., Jyllinge, Roskilde, Danlando. Barkley, f-ino M. L., San Francisco, Cal., Usono. Van Dooren, s-ro J. W. M., Weert, Nederlando. Fettes, s-ro C., Rathfarnham, Dublin, Irlando. Koopmans, f-ino B. A., Velp, Nederlando. Neuwirth, f-ino I., Neustadt, Germanujo. Sunardo, s-ro E., Paris, Francujo. Tharme, f-ino H., Bangor, Caerns., Kimrujo. Woods, s-ino F. J., Allestree, Derby, Britujo.

MEMBRO-SUBTENANTO 1969

273 Per. de MELO, s-ro Roskildes, Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

9 Bernard, s-ro R.; 10 Dabiezies, s-ro H., Francujo. 11 Bily, s-ro H.; 12 Jolliet, s-ro L.; 13 Klünder, s-ro W.; 14 Kraft, s-ro T., Germanujo. 15 Henderson, s-ino D. M.; 16 Westgaard, s-ro D., Kanado. 17 van Dijk, s-ro J. P.; 18 Kos, s-ro K.; 19 Kroon, s-ino J.; 20 Muller, s-ro J. L.; 21 Termaat, f-ino F. P., Nederlando. 22 Allan, s-ro J. T.; 23 Clarkson, s-ro R. J.; 24 Langman, s-ro D. J., Nov-Zelando. 25 Almén, s-ro H., Svedujo. 26 Bokelman, s-ino J.; 27 Jones, f-ino D. C.; 28 Lambert, s-ro J.; 29 Thomson, s-ro K.; 30 Williams, s-ro W., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Jugoslavio: Crnić, s-ro Stjepan, 2,85.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Danlando: Bagger, s-ro P. V., 58,—. Nederlando: Winkel, s-ro J., 4,—.

Ĝenerala kaso: Norvegujo: Horrisland, s-ro Ragnvald, 8,—.

Patrono A de TEJO: Britujo: Markarian, s-ro R. H. M.; Parker, s-ro F. Danlando: Bagger, s-ro P. V. Hispanujo: Alberich, s-ro T. Italujo: Azzi, s-ro G.; Bronchi, prof. A.; Chiorboli, f-ino E.; Corsetti, s-ro R.; Cuppini, s-ro V.; Dall'Acqua, s-ro V.; Dazzini, d-ro M.; Fabris, s-ro L.; Fagetti, s-ro L.; Feretti, f-ino F.; Ferrari, s-ro C.; Foa', s-ro C.; Galbusera, s-ro F.; Gambuti, s-ro A.; Gimelli, s-ro G.; de Giorgi, s-ro A.; Martini, s-ro G.; Menabene, d-ro A.; Mingo, prof. E.; Minnaja, d-ro N.; Parisi, s-ro N.; Pinori, ges-roj R.; Rodari, s-ro E.; Rossi, s-ro L.; Spertini, s-ro G.; Stoppolini, d-ro U.; Teruzzi, s-ino S.; Turone, s-ro G. Japanujo: Umeda, s-ro Y. Nov-Zelando: Richardson, s-ino M.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

esperanto, januaro 1970 / 19

Oficiala informilo

INTERNACIAJ KONKURSOJ

Stato je la 30-a de novembro 1969

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1	(1) Finnlando	2401	3240	134,94
2	(2) Usono	4022	4620	114,87
3	(3) Italujo	3737	4000	107,04
4	(4) Danlando	2648	2790	105,36
5	(5) Jugoslavio	3643	3640	99,92
6	(6) Svedujo	6192	6100	98,51
7	(8) Britujo	5835	5695	97,60
8	(10) Nederlando	5110	4875	95,40
9	(9) Japanujo	3837	3635	94,74
10	(7) Germanujo	6257	5580	89,18
11	(11) Svislando	1775	1555	87,61
12	(12) Francujo	6887	5838	84,77
13	(13) Hispanujo	2879	2360	81,97
14	(14) Brazilo	2950	1978	67,05
15	(15) Belgujo	1836	1145	62,36

Konkurso II

1	(1)	Grekujo	288	456	158,33
2	(2)	Aŭstralio	1275	1610	126,27
3	(3)	Israelo	524	525	100,19
4	(5)	Nov-Zelando	1171	1127	96,24
5	(6)	Aŭstrujo	1231	1180	95,85
6	(4)	Kanado	1103	1054	95,56
7	(7)	Argentino	650	582	89,54
8	(8)	Norvegujo	1343	1185	88,24
9	(9)	Sudafriko	250	185	74,—
10	(10)	Madagaskaro	250	120	48,—
11	(11)	Islando	250	95	38,—

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ la nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Laŭ la rezultoj je la 31-a de decembro la kotizperanto de la venkinta lando en ĉiu el la du konkursoj ricevas je sia dispono libropremion de 100 gld.

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

ANONCETOJ



Senpage
gvidas
turistojn
Stanislaw
Bartovic,
Vázska 3050,
Pieštany,
Ĉeĥoslovakio
(tel. 3314)

Univox — nova kurso de Esperanto. 8 gramofonaj diskoj, 33 t/m (tonkarto milfoje uzeblaj) kun proks. 1200 praktikaj frazoj kaj esprimoj. Tekstlibroj: Esperanto plus unu nacia lingvo (22 elekteleblaj). Prezo: 3,50 US dol. (18,20 sv.kr., 50,40 steloj aŭ egalvaloro). Sama kurso sur sonbendo 9,5 cm/sek. kostas 5 US dol. (26 sv.kr., 72 steloj). Mendebla ĉe Inter — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedujo. Pĉk 42 66 60.

Bonega angla gastdomo en sudorienta marborda urbo estas "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo. Venu kaj lernu ankaŭ la anglan lingvon!

Mendu novaĵon! Praktika kovrilo por via Jarlibro de UEA el bela kaj fortika materialo. Sendu 2,60 sv.kr. (—,50 US dol., 1,80 gld. aŭ 4 rpk) al Inter — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedujo. Pĉk 42 66 60.

Ĉu ekzistas en via lando, aŭ asocio por suferantoj de la neinfekta haŭt-malsano psorazio, aŭ io medikamente interesa rilate al psorazio? Respondu al: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, NN1 5AT, Britujo. Dankon!

Esperanto-Rondeto Szk Bučovice, Ĉeĥoslovakujo, aranĝos letervesperon dum Pasko 1970. Bonvolu sendi al ni ĉiuspecan Esperanto-materialon por planota ekspozicio kaj korespondproponojn. Respondo certa!

Nova germana gimnazia Esperanto-klaso intencas kontakti kun 14- ĝis 19-jaraĝaj gejunuloj laŭgrade de la lingvoscio jene: kolektiva leterkontakto, lumbild- kaj sonbendintersanĝo, individua leterkontakto, reciproka vizitado. Detalojn petu ĉe: s-ro Armin Grötzner, D-864 Kronach, Gymnasium, FR Germanujo.

Mi deziras kompletigi miajn kolektojn de "Germana Esperantisto", "Hungara Heroldo", "Sennaciulo", "Paco", "La Ĝusta Vojo", "Malgranda Revuo" kaj "La Revuo Orienta". Kiu povos helpi? Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Por instigi lokajn instancojn pri Esperanto, ni bezonas turismajn faldfoliojn, ĉefe pri feriaj lokoj. Bv. sendi tuj kaj amase al: Laurie, 6 Marlborough Road, Bournemouth, Britujo.

Se la frostoj vintra ĝenas vin, venu al Benidorm, kie ĉiam estas printempo. Bonega vintra klimato por ripozantoj, malfortuloj, bronkituloj, astmuloj, reŭmatismuloj, frostsentemuloj, k.c. Bonaj hoteloj kaj klinikoj. Samideanoj kaj neesperantistoj (oni havas interpretistojn) petu informojn de d-ro V. Pedro Signes, Klinikio Virgen de Fátima, Benidorm, Hispanujo.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Port Credit, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

Nia klubo aranĝos dum majo ekspozicion pri infandesegnaĵoj. Ĉiu sendinto ricevos almenaŭ belafrankitan poŝtkarton. Simon (Michel), 119, Chemin des Plantes, F-91-Athis-Mons, Francujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la



Ni varbas abonantojn de 1970 por

Monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Abonprezoj:

por 1 jaro : 5.00 gld.

por 2 jaroj: 7.50 gld.

por 3 jaroj: 10.00 gld.

Eldonas: Ĉina Esperanto-Ligo

Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

Bonvolu aboni ĉe niaj perantoj en via lando, aŭ rekte ĉe ni,
Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino,
Ĉinio.

akra, kritikema, amuza

kvinpinto

la gazeto de SEJU
nova alternativo por ĉiam pli da homoj
abonante nun, vi ricevos kvar aktivigajn kaj stimu-
lajn numerojn dum 1970. La novan jardekon ni
enkondukas per sveda specialaĵo - **seksa numero**.

4 sv. kr. aŭ 6 int. resp. kup. al: Anders Jägervall,
Box 1160, S-221 05 Lund, Svedujo.

Semajno de Internacia Amikeco

(22-28 februaro 1970)

Ni salutu ankaŭ al ne-esperantistoj per **amiko-kartoj**
po 0.35 gld. + sendokostoj 10 %

Ĉe la Libroservo de UEA vi povas mendi ankaŭ
belan trikoloran glumarkon de S.I.A. (po 0,06 gld.)
por surglui sur leterojn kaj salutkartojn.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

La kantona psikiatria kliniko

Wil, Svislando

serĉas personaron

por la prizorgado de psike kaj korpe malsanaj homoj.

Ankaŭ gelektoj de la flegista profesio estas akceptataj por psikiatria malsanul-flegado.

Bona salajro eĉ dum la tri-jara lernotempo.

Pli detalajn informojn nedevige donas la

Aertzliche Direktion
Psychiatrische Klinik
CH-9500 Wil, Svislando

ATENTON ESPERANTISTOJ!!!

La plej evoluintan lingvaĵon
la plej larĝan panoramon de Esperanto-Movado
donacas al vi ĉiutage kaj senpage

LA ESPERANTO-DISAŬDIGOJ DE POLA RADIO

Ekde novembro 1969 ili aŭdiĝas je la horoj:

6.30 - sur la ondoj: 25, 31, 41, 49 kaj 200 metroj
16.30 - sur la ondoj: 31 kaj 41 metroj.

En la disaŭdigoj enestas - la landaj kaj mondaj novaĵoj, aktualaj komentarioj, sociaj, ekonomiaj, literaturaj, kulturaj, turismaj kaj alitemaj elsendaĵoj.

Same abundas la Esperanto-temaj eroj - la dimanĉa "Esperanto-Ekspreso", sed ankaŭ dumsemajnaj: "Koncerto kun bondeziroj", felietonoj, gazet-trarigardoj, rubrikoj por komencantoj, blinduloj kaj ankoraŭ pure "esperantaj" Anguletoj en la german-, sved- kaj danlingvaj disaŭdigoj

Kaj krome - la multaj konkursoj valoraj premioj senpagaj vizitoj en Pollando

Ĉio ĉi estas por vi se vi aŭskultas kaj fojfoje skribas al:

POLA RADIO, ESPERANTO-REDAKCIO,
VARSOVIO, POLLANDO

P.S.: post peto ĉiu ricevos detalan programon!

El vasta kalendaro 1970 de la ESPERANTISTA KULTURDOMO Kastelo "GRESILLON" 49 -BAUGE- Francujo

baldaŭaj esperantistaj okazontaĵoj indas allogi vin
EN FEBRUARO:

(sendu aliĝojn antaŭ la 10-a de januaro)

1) alveno la 4an de februaro — foriro la 10an de februaro.

2) alveno la 10an de februaro - foriro la 18an de februaro.

Gramatiko - Kursoj - Konversacioj - Distraĵoj.
DUM PASKAJ FERIOJ:

alveno: 22 mar. - foriro: 4 apr.

- Studoj kaj Pedagogio -

1a semajno: (22-29 marto)

Naŭa Kultura Semajno organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

Studo de tekstoj - Pedagogia inicado al instruado de Esperanto - Kultura kaj arta aplikado de la lingvo - Seminario por respondeculoj pri informado - Distraj vesperoj.

2a semajno: (29 marto - 4 aprilo)

Kursoj - Konversacio - Aplikado de la lingvo - Diversaj distraĵoj.

Detala programo pri la somera sezono: (28 junio - 30 aŭgusto) aperos en venonta numero.

En ĉiuj sezonoj, "Greziljono" disponigas al vi plej diversajn allogaĵojn: Esperantistajn, kulturajn programojn - Ripozon - Ekskursojn - Sanan nutradon - Malaltajn prezojn - Internacian kaj familian etoson.

- Informiĝu ĉe la ĉi-supra adreso -